

人民中國報道

# El Populo Cínico

Apr. 1952



# La Historia Movado Kontraŭ Korupta Alproprigo, Malŝparo kaj Burokratismo

— Liu Zun-ĉi —

## 1. Forlavi la malpuraĵojn postlasitajn de la malnova socio

De decembro de 1951 tra la tuta Ĉinio disvolviĝas granda popolamasa movado, nome la movado kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo inter la laborantoj de registaraj institucioj kaj publikaj entreprenoj.

Ĝi estas movado de historia signifo, kia neniam okazis nek povis okazi en iu ajn pasinta epoko en Ĉinio. Nur la popoldemokratia reĝimo sub la gvido de la Komunista Partio kuraĝas entrepreni tian popolamasan movadon por elimini la putrajn heredaĵojn de la reakciaj regadoj pasinttempaj, kaj povas elporti la provon de tia movado kaj per tio sin pliperfektigi kaj plifortigi.

Estas konate, ke korupta alproprigo havas historion preskaŭ same longan kiel tiu de la malnova Ĉinio. En la pasinteco, kvakam kelkfoje estis personoj kiuj proparolis pro "senkorupta politiko", tamen en la socio regata de bienula klaso, ili nur ekzumis kiel moskito. Post la duonkoloniigo de Ĉinio, korupta alproprigo kaj morala putrado estis krome kuraĝigataj de la eksterlandaj kapitalistoj kaj la kompradora klaso, ke ili virtuale fariĝis la politika trajto de tiu ĉi antikva lando. Ekz. la imperiistoj iam pruntedonis monon al iu favorata de ili militaristo por ke li povu subaĉeti per ĝi preskaŭ la tutan anaron de la tiel nomata "Parlamento" elekti lin prezidanto. Kaj kontraŭ la grandkvantaj subaĉetoj de la Usonaj imperiistoj "laŭleĝe" akiritaj, la renversitaj Kvar Grandaj Familioj de Kuomintang donacis al Wall-strato riĉaĵojn kaj bazlokojn de nia lando. Efektive, tiam, lertuloj en korupta alproprigo kaj morala putrado, en lukso kaj malŝparo, estis enviaj interne de la regantaro.

Post la liberiĝo de la ĉina ĉeftero, la Popola Registaro ne povis ne principe restigi ĉiujn laborintojn de Kuomintang-reĝimo en siaj laboroj. En la laborado kaj politika lernado dum la pasintaj tri jaroj multaj el ili jam sin remuldis kaj fariĝis honestaj kaj konsciencaj kadroj, sed neeviteble restas ne malmultaj kiuj ankoraŭ konservas diversajn egoismajn kutimaĵojn kunportitajn el la malnova socio, kaj iuj eĉ profitante la konfidon de la Popola Registaro al ili, komplotas kun leĝrompantaj komercistoj por fari krimagojn de korupta alproprigo kaj malutilo al la propraĵoj de la popolo.

Krome estas malgranda nombro da revoluciaj kadroj, antaŭe senmakulaj, kiuj tentate de la leĝrompantoj el la burĝaro kun kiu ili havas diversajn kontaktojn, ankaŭ infektiĝis de la putraj kutimaĵoj kaj degeneris al koruptitoj.

Kontraŭ la supre diritaj fenomenoj de korupta alproprigo kaj malŝparo kiuj kompromitas la popolan intereson, la Komunista Partio kaj la Centra Popola

Registaro adoptis senkompromisan politikon de likvido. Prezidanto Maŭ Ze-tung diris en sia Novjara saluto de 1952: "Mi ankaŭ deziras al ni venkon en nia nove malfermita batalfronto, t.e. alvoki la popolon kaj ĉiujn laborantojn de nia lando al ekago vaste kaj senkompromise disvolvi grandskalan bataladon kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo por forlavi tiujn malpuraĵojn postlasitajn de la malnova socio."

## 2. Movado popolamasa

Estas ĝustatempe disvolvi tiun ĉi bataladon nun en Ĉinio, ĉar unuflanke, ni devas grandforte subteni la Ĉinajn Popolajn Volontulojn por daŭrigi nian helpon al la korea popolo kontraŭbatali la Usonajn agresantojn kaj defendi la pacon de la Malproksima Oriento kaj la tuta mondo, kaj aliflanke, ni ankaŭ devas akumuli grandkvantan kapitalon per pliprodukto kaj ŝparo por akceli la efektivigon de la plano ŝanĝi nian landon agrikulturan en landon industrian. Korupta alproprigo, malŝparo, kaj ilia varmbedo—burokratismo, estas grandaj malhelpoj sur la vojo de pliprodukto kaj ŝparo. Nur kiam tiuj malhelpoj estas radikale forigitaj, la riĉaĵoj kreitaj de la granda kaj diligenta ĉina popolo povas esti tute utiligataj al la konstruado de la patrujo.

Ne estas malfacile kompreni kial tiu ĉi movado ekde sia komenciĝo estas varme akceptata de la vastaj amasoj de laboristoj, komizoj, kamparanoj, intelektuloj kaj la plej granda parto de la laborantoj de registaraj institucioj. Nur en tre mallonga tempo ĝi jam akiris rimarkindan atingon. La koruptitoj estas malkovritaj unu post la alia en diversrangaj registaraj institucioj kaj publikaj entreprenoj. Konsciinte la hontindecon kaj malnoblecon de siaj agoj pro la movado, grandparto el la koruptitoj propravole malkaŝis al siaj superuloj aŭ kolegoj kiel ili profitante sian oficon post la fondiĝo de la nova Ĉinio ricevis subaĉeton de komercistoj, proprigis al si publikan monon, ktp. kaj redonis siajn koruptajn alproprigaĵojn esprimante sian penton kaj decidon de sinrebonigo. Escepte tiujn kies krimfaroj estas speciale grandaj, ĝenerale ili estas indulgeme traktataj de la registaro, ĉar la Popola Registaro kredas, ke en la socio de nova demokratio ili estas remuldeblaj per edukado. Ankaŭ estas kelkaj kiuj ne volas malkaŝi siajn krimfarojn, sed ili estos malkovritaj sub la kontrolo de la registaro kaj popolamaso. Inter ili, tiuj, kies krimfaroj estas precipe grandaj, ĉu komunistoj, ĉu nekomunistoj, ĉu laborantoj de ia ajn rango, devas ricevi severan punon.

La vastaj popolamasoj partoprenis tiun ĉi movadon kaj trovis el ĝi kiel malsama estas la Popola Registaro ol ĉiuj tiuj en la pasinteco kaj ol tiuj kapitalismaj de fremdlandoj. Ili neniam vidis aŭ aŭdis tian registaron kiu insistas pri senkorupteco kaj kontraŭas al korupta alproprigo. Kiam ĵurnaloj kaj radiostacioj raportas pri koruptaj alproprigoj malkovritaj, oni kalkulas kiom



perdis la ŝtato pro tiuj koruptaj alproprigoj. Ili tiel abomenas tiujn krimfarintojn kaj zorgas pri la publikaj riĉaĵoj kaj la nacia intereso. Iuj influitaj de eksterlanda reakcia propagando iam dubis ĉu la reĝimo gvidata de la Komunista Partio ankaŭ iom post iom falos pro koruptiĝo kaj putriĝo. Nun ili kredas ke tia okazo estas nebla.

### 3. Batalo kontraŭ la korupta influo de burĝaro

Dum sia malkovrado de la koruptaj alproprigoj de laborantoj de registaraj institucioj la registaro kaj popolamasoj tuj trovis, ke tiuj agoj ne nur havas sian historian devenon, sed pli grave sian aktualan socian devenon. Ne ĉiuj el la nacia burĝaro kiu ĝuas laŭlegan pozicion en nova Ĉinio kontentas pri la rajtoj kiujn la Komuna Programo de la Politika Konsiliĝa Konferenco de Ĉina Popolo difinas por ili, t.e. ili rajtas libere administri siajn industrion kaj komercon kaj akiri laŭlegan profiton en la sfero utila al la nacia ekonomio kaj popola vivo. Kontraŭe, multaj malobeas la Komunan Programon per la kontraŭlegaj agoj: subaĉeti laborantojn de registaraj institucioj kaj publikaj entreprenoj, praktiki kontrabandon kaj eviti impostpagon, ŝteli proprajojn de la ŝtato, fari fuŝan laboron kaj uzi netaŭgajn materialojn en konstruo aŭ varprodukto mendita de la ŝtato, kaj ŝteli ŝtatajn ekonomiajn informojn por merkata spekulacio. Iuj pligrandaj kapitalistoj eĉ sekrete organiziĝis por monopoli la var-mendojn de registaraj institucioj kaj ŝtataj entreprenoj, kaj aneksi aŭ ruinigi malpli grandajn privatajn entreprenojn samspecajn per la malhonoraj rimedoj kiujn kutimas uzi la plutokratoj en kapitalismaj landoj.

La abomena naturo de tiuj leĝrompantaj privataj industriistoj kaj komercistoj estis unu post la alia malkovrita rezulte de la akuzoj de la laborantoj de registaraj institucioj kaj publikaj entreprenoj, komizoj aŭ laboristoj, kiuj estis koruptitaj de ili kaj nun jam konsciiĝis kaj pentis pri sia kulpo. Precipe la komizoj kaj laboristoj de entreprenoj de leĝrompantaj komercistoj, plej bone scias la fiagojn de siaj mastroj, kaj ne plu toleras la egoismajn agojn damaĝantajn la intereson de la nacio. Ili unue persvadis siajn mastrojn malkaŝi propravole siajn kontraŭlegajn agojn al la loka registaro. La plej grandan parton de la industriistoj kaj komercistoj farintaj subaĉeton, kontrabandon, eviton de impostpago kaj aliajn kontraŭlegajn agojn, post kiam ili mem malkaŝis siajn kontraŭlegajn agojn, la registaro traktas per indulgema politiko. Sed ne povas esti pardonataj tiuj leĝrompantoj, kiuj ne konfesas siajn krimojn pri kiuj atestatoj jam estas trovitaj, kaj kiuj faris tre grandajn krimagojn kaj estas forte malamataj de la popolamasoj. Kaj el ili la eta nombro da farintoj de speciale grandaj krimagoj devas esti sendataj al popola juĝejo.

Necesas mencii, ke dum la reakcia regado de Kuomintang la nacia burĝaro de Ĉinio preskaŭ sufokiĝis subpremate de imperiismo kaj burokrata kapitalismo. En certa tempo kaj certa grado parto de ĝiaj reprezentantaj personoj partoprenis aŭ simpatiis la popolan liberigan bataladon. Post la liberiĝo de Ĉinio la nacia burĝaro partoprenis en la reĝimo de popoldemokratia unuecfronto gvidata de la laborista klaso, kaj la privata kapitalisma ekonomio ankaŭ fariĝis unu el la 5 ekonomiaj elementoj de nia lando. Sur la bazo de la Komuna Programo ĝia pozicio en politiko kaj ekonomio estas

protektata de la ŝtato, kaj dum la pasintaj du jaroj la ŝtato ankaŭ diversflanke praktikis la politikon de subteno al industrio kaj komerco helpante la naciajn burĝojn venki siajn malfacilojn post la milito kaj refunkciigi kaj disvolvi siajn entreprenojn. Post la forpeliĝo de la imperiisma forto el la ĉina ĉeftero kaj la terricevo de la vasta kamparanaro el la agrara reformo, precipe post la stabiliĝo de la varprezoj, la privataj entreprenoj ĝenerale havas senprecedencan evoluon. Tamen kiam iliaj entreprenoj disvolviĝas kaj rapide prosperas, la nacia burĝaro ne plu atentis la Komunan Programon kaj la ŝtatajn leĝojn, kaj diversmaniere subfosas la nacian ekonomion kaj popolan vivon, spekulas kaj akaparas, por akiri pli kaj pli da profito.

### 4. Ne ŝanĝo en Komuna Programo

La nuna movado ne celas elimini la nacian burĝaron de Ĉinio. Ne ŝanĝiĝis la politiko de la Ĉina Komunista Partio kaj la Centra Popola Registaro unuigi la nacian burĝaron laŭ la difino de la Komuna Programo. Sed la novdemokratia ekonomio estas la prepara proceso por konduki Ĉinion en socialismon. La privata kapitalismo nepre estas malpermesata senlime kaj blinde evolui, kaŭzante damaĝon al la nacia ekonomio kaj popola vivo.

La 5-an de januaro, en la Konstanta Komitato de la Landa Komitato de Politika Konsiliĝa Konferenco de Ĉina Popolo, vicprezidanto Ĉoŭ En-laj diris ke la ĉina nacia burĝaro, "en la nacia, socia kaj ekonomia vivo povas agi en certaj rilatoj, sed ne povas agi en aliaj rilatoj; ili estas permesataj disvolvi en certaj rilatoj, sed malpermesataj disvolvi en aliaj rilatoj. Ĉia ekonomia entrepreno utila al la nacia ekonomio kaj popola vivo estas permesata disvolviĝi, sed ĉia privata ekonomia entrepreno neutila aŭ malutila al la nacia ekonomio kaj popola vivo estas malpermesata disvolviĝi kaj ĉia ekonomia entrepreno kiu direktas la nacian ekonomion kaj popolan vivon, devas esti unuece administrata de la ŝtato mem."

Nun, kiel ni jam menciis, la malkaŝitaj evidentaj kaj ĝeneralaj kontraŭlegaj agoj de la burĝaro kiuj malutilas al la nacia ekonomio kaj popola vivo estas: subaĉeto, evito de impostpago, ŝtelo de ŝtataj proprajoj, faro de fuŝlaboro kaj uzo de netaŭgaj materialoj, kaj ŝtelo de ŝtataj ekonomiaj informoj. En la socio la kampanjo kontraŭ ĉi tiuj kvin specoj de agoj de la kontraŭlegaj kapitalistoj estas nedisigebla de la kampanjo kontraŭ korupta alproprigo, malŝparo kaj burokratismo en la registaraj institucioj kaj publikaj entreprenoj.

La ĉina popolo ĝojkrias la venkon en tiu ĉi fronto. Unuigite kaj kun plena konvinko ĝi estas kondukanta tiun ĉi historie signifoplenan movadon al la fino de plena sukceso, ĉar ĝi profunde scias ke tra tiu ĉi movado la diversrangaj registaroj de Ĉinio despli puriĝos kaj fortikiĝos, la sociaj moroj de Ĉinio pli noviĝos kaj modestiĝos, kaj en la tutlanda produkta fronto estos akirita pli granda sukceso. La fakto ankaŭ montriĝas tia. Nun en la popolamaso des pli altiĝis la prestiĝo de la Komunista Partio kaj la Popola Registaro; en la socio oni ĝenerale jam rigardas koruptan alproprigon kaj malŝparon kiel hontindaĵon kaj rigardas diligentecon kaj modestecon kiel honoron; la varprezoj pli stabiliĝis; la produktado plirapide evoluas antaŭen; kaj tagon post tago plialtiĝas la konstrua entuziasmo kaj produkta aktiveco de la popolamaso.

# Heroinoj sur la Korea Fronto

Sun Ju

Inter la delegitoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, nove resenditaj de siaj kamaradoj sur la korea fronto por raporti al la hejmlanda popolo, troviĝis dek naŭ virinoj. Dank' al liberigo, ĉinaj virinoj finfine gajnis sian laŭleĝan ekonomian kaj socian pozicion. Sekve ne estas surprize ke ili sin proponis en miloj por iri al la defendo de Koreio, lando apartigita de ilia propra patrio nur per la larĝo de la Jalu-Rivero, kaj tiel konservi sian malfacile akiritan feliĉon kaj pacon.

Ĉu ilia laboro estas politika, kultura aŭ eduka; ĉu ili estas flegistinoj aŭ veturigistinoj, la virinaj volontuloj pruviĝis la vera enkorpiĝo de kuraĝo kaj honoro. Ili estas neniam teruritaj de la klimata aŭ topografia severeco, nek timigitaj de la Usonaj bombado kaj bombardado—iliaj spertoj jam bone hardis ilian volon rezisti agreson ĝis ĝia lasta spuro estas forviŝita de la landkarto de Koreio.

Rigardu al Lo Ke-ŝien kaj lernu el ŝia historio kiel la batalkampoj de Koreio faris el ĉi tiu timema kampara knabino heroinon. Malgranda Lo, kiel la volontuloj karese ŝin nomis pro ŝia malalta staturado, antaŭe timis multajn aĵojn: la malluma nokto, demonoj, spiritoj.... Kiam Usona agreso pli kaj pli proksimiĝis al la ĉina landlimo, Malgranda Lo havis internan batalon kontraŭ siaj timoj. Fine ŝi venkis kaj sin proponis por servo en Koreio. Kiam ŝia patrino kontraŭis, ŝi kvietigis ŝin rememorigante al ŝi kiel, antaŭ ne tre multaj jaroj, la japanaj agresantoj ruinigis ilian vilaĝon.

Iun malluman nokton ĉe la fronto, la ĉefflegistino vokis Malgrandan Lo kaj kelkajn helpantojn ŝiajn kaj diris:

“Niaj trupoj estas moviĝantaj tiel rapide ke multaj vunditoj devas esti provizore postlasitaj. Mi komisias al vi ilin prizorgi. Bedaŭrinde ĉi tie troviĝas neniam iloj kaj ankaŭ jam elĉerpiĝis la medikamentoj.... Tamem malgraŭe vi ankoraŭ devas kiel eble plej bone ilin prizorgi.”

La ĉefflegistino montris per sia elektra torĉo en la direkto al la malluma kaverno kie kuŝis la vunditoj. Poste ŝi foriris.

Malgranda Lo devis fari tujan decidon, ĉar ne estas tempo por esti timema. La sekuro kaj bonfarto de 80 pacientoj inter kiuj 20 estis gravevunditoj, estis en ŝiaj manoj.

Stimulite de neceseco, ŝi kaj ŝiaj helpantoj fariĝis inventemaj. En tiuj kelkaj tagoj kiuj sekvis antaŭ ol la malgranda izolita “hospitalo” estis savita, Malgranda Lo kaj ŝiaj helpantoj—farante el malplenaj Usonaj obusingoj kaj ladaj skatoloj kulerojn, lampojn, bolpotojn kaj rizpelvojn—flegis la vunditojn kiel eble plej bone.

Kelkajn monatojn poste, Malgranda Lo estis laboranta en iu baza hospitalo. Kiam ŝi estis servanta matenmanĝon al pacientoj kvar Usonaj aeroplanoj subite malleviĝis malalten kaj ĵetis incendibombojn proksime al la aerataka rifuĝejo en kiu estis du ŝarĝaŭtoj ĝuste alvenintaj kun vunditaj armeanoj kiam la alarĝo sonis. Malgranda Lo ekmemoris pri tiuj alvenintoj kiam la flamoj alproksimiĝis al la rifuĝejo. Ignorante la flamojn, ŝi kondukis grupon da personoj

en la rifuĝejon kaj portis la vunditojn for de la ŝarĝaŭtoj al sendanĝera loko.

Kiam Malgranda Lo vizitis Mukdenon kune kun la delegacio, ŝi priskribis la novajn kavernojn en kiuj ŝi estas laboranta: “Nun ni havas purajn kaj belajn ĉambrojn por pacientoj en la kavernoj. Dum la Printempa Festo ni instalas elektrajn lampojn kaj servis al la pacientoj viandajn pastbulojn kaj bongustan manĝon kun kvar pladoj.”

Ni demandis nian malgrandan heroinon kiel ŝi konkeris sian antaŭan timemon.

“Nu,” ŝi diris, “mi kutimis timi ‘demonojn’ kaj similajn aĵojn. Sed post kiam mi partoprenis la trejnajn

## La Plej Bona

Jaŭ

La ĉinaj porcelanoj jam de longe estas mondfamaj pro sia alta kvalito. Iliaj Produktaĵoj inkluzivas multajn provincojn, tamen en la tekniko de desegno kaj glazurado, Kingtehĉen superas ĉiujn aliajn lokojn.

Kingtehĉen, urbeto en la norda angulo de Kiangsi-Provinco, havas abunde da plej delikata “kaŭlin”—la argilo necesa por fari porcelanon. La akvo en la putoj de Kingtehĉen kaj la rivero borderanta la urbon en la nordo entenas bonan mineralan kvaliton, kiu estas plej taŭga por la procedo de purigo de la “kaŭlin”.

Por jarcentoj ĉi tiu urbo estas fama pro siaj porcelanaj produktaĵoj. Ĝi ricevis sian nomon de la imperia rego de Kingteh (1004-1008 p.k.) de Sung-Dinastio. Tiam, specialaj oficistoj delegitaj de la imperiestro restis en la urbo por zorgi pri la prospera porcelana industrio. Dum la sekvintaj dinastioj kreskanta nombro da bakfornegoj fondiĝis en la urbo. Iam, la nombro de laboristoj estis entute pli ol 60,000. Rezulte, Kingtehĉen fariĝis la centro de porcelana industrio en Ĉinio.

Tamen, dum la multjara misregado de Kuomintang-a reĝimo, malkaraj japanaj porcelanaj varoj inundis ĉinan merkaton. La porcelana industrio de Kingtehĉen suferis multege. La jaron antaŭ liberigo, nur dekduo da bakfornegoj funkciis, kaj malpli ol 1,000 laboristoj estis dungitaj.

Post la liberigo en aprilo, 1949, la urbo regajnis sian eminentecon en produkto de porcelanoj. La Popola Registaro klopodis revivigi la industrion per pruntedono de mono, grandaj mendoj per ŝtataj komerc-kompanioj, malpliigo de transportaj kostoj kaj plibonigo de transportado.

Specialistoj, teknikistoj kaj laboristoj estas multe kuraĝigitaj studi novajn kaj plibonajn



kurson kaj lernis historian materialismon, mi komencis dubi ĉu efektive ekzistas spiritoj. Kiam mi eliris unuope en la mallumon, mi ĉiam penis forpeli mian timon dirante al mi mem ke mi estas nur imaganta fantaziaĵojn, kaj ke mi estus ne taŭga por la grandaj fondintoj de marksismo. Tiamaniere mi iom post iom forigis mian timon. Nun kiam mi rigardas returnen, mi ne povas ne ridi pri tiu Malgranda Lo kiu timis demonojn!"

\* \* \* \* \*

Multaj virinaj volontuloj estas membroj de la Novdemokratia Junula Ligo. Unu el ili, Ĉen Feng-ĵing, servis kiel flegistino. Dum iu aeratako, ŝi kun granda klopodo sukcesis transporti ĉiujn pacientojn de ŝi prizorgatajn el la malsanulejo al rifuĝejo. Kiam ŝi estis mem eniranta en la rifuĝejon, ŝi ekaŭdis iun korean maljunulinon vokanta helpon. Alkuregante ŝi trovis ke unu tegmentangulo de ŝia domo estas en flamoj. Sen momenteta hezito kaj spite ke la aeroplanoj estas an-

koraŭ flugantaj supre, Ĉen Feng-ĵing surgrimpis la tegmenton, forprenis la brulantan pajlon kaj savis la domon de detruo.

Krome, estis Ju Ŝien-kuej, membro de la Komunista Partio, ankaŭ flegistino. Respondante al la urĝa alvoko de la regimenta stabo por senprokraste transloki ĉiujn vunditojn al la postfronto, Ju vojaĝis multajn fojojn, portante la vunditojn sur sia dorso por ilin evakui, ĝis ŝi svenis pro troa laciĝo. Kiam ŝi rekonsciigis, ŝi rifuzis ripozi. Helpate de alia kamarado, Ju forportis dek ok gravevunditojn el la vundito-stacio kiun la malamikaj trupoj eniris la sekvantan vesperon. Ŝi estis poste dekoraciita de la Korea Demokratia Popola Respubliko pro ŝia malegoisma sindonemo al devo.

Liu Ĉien-kuej estas alia flegistino kiu ricevis citon pro merito en sia peniga laboro kaj prizorgo al la vunditoj. La vundito-stacio en kiu ŝi estis laboranta proksime de la fronto estis simple kabano, sen ia ajn ekipaĵo aŭ meblo krom granda hejtata briklito. Anstataŭ riski endormiĝon sur la komforta varma briklito, ŝi deĵore pasigis kvin sinsekvajn noktojn ekster la kabano en la malvarmo, preta respondi la vokojn de siaj pacientoj.

Vang Ze-haŭ insistis doni pecon da haŭto de la dorsflanko de sia mano kiam la vundo de iu volontulo bezonis grefton. Malgraŭ la malkonsento de la armeano, la kuraĝega knabino kontraŭdiris: "Kamarado, ni estas el la sama klaso. Ĉu gravas ke tiu peco da haŭto kreskas sur via mano aŭ la mia? Mi ne faras tion por vi persone, sed tiele vi povas tuj resaniĝi kaj servi al la popolo."

\* \* \* \* \*

Al la trupoj venas inspiro ankaŭ de la kulturaj grupoj akompanantaj la armeajn unuojn. Dum marŝoj ili instigas la spiriton de la batalantoj per politika agitado, dum ripozaj periodoj, per kantoj kaj dancoj. Iu grupo, konsistanta el kelkaj junaj knabinoj, donis ok prezentojn en unu tago, vojaĝante de loko al loko sur perfidemaj montvojoj, kun muzikaj instrumentoj alligataj al siaj dorsoj. Post la prezentoj, la knabinoj ofte riparigis la uniformojn de la armeanoj per kudriloj kaj fadenoj kiujn ili kunportis. La armeanoj estis tiel dankemaj ke ili speciale metis flanken biskvitojn el siaj porcioj por tiuj kulturaj laborantinoj.

Telegrafaj kaj telefonaj laborantinoj kontribuis sian parton en la batalo kontraŭ agreso en Koreio per sia klopodo ke la komunikaj linioj estu ĉiam malfermaj. Telegrafistinoj uzis siajn pugnojn sur sia relajo dum vintraj tagoj kiam la termometro montris dekkvin gradojn sub nulo kaj iliaj fingroj sensentiĝis. Telefonistinoj kiel Ting Ŝu-feng fidele restis ĉe siaj postenoj de komutiloj dum aeratakoj.

Virinoj ankaŭ plenumas politikan kaj propagandan laboron inter la volontuloj, en unuohomaj tranĉeoj kaj aeratakaj ŝirmejoj apenaŭ sufiĉe grandaj por ĉirkaŭturniĝi en ili. Ŝi Ning, redaktorino de iu novaĵa bulteno, diris en iu Pekina kunveno: "Kelkfoje ni estis tiel dormemaj ke ni eĉ ne povis teni malfermaj niajn okulojn. Sed kiam ni ricevis kontribuaĵojn por la gazeto, senditajn de la batalantoj ĉe la fronto kaj malnete skribitajn sur pakpapero de pakajo de cigaredoj, ni tuj revigliĝis."

Ĉang Vej-ming estis propagandistino en iu artileria unuo. Kiam ŝi sin proponis por iri al Koreio, ŝi ne malkovris al la aŭtoritatoj ke ŝi estis naskinta infanon

# Porcelano de Ĉinio

## Ming

metodojn por plibonigi siajn teknikojn de glazurado kaj bakado. Teknikaj kaj leglernaj vesperlernejoj estas starigitaj por laboristoj. La entuziasmo de laboristoj al konstanta plibonigo de sia laboro ege pliiĝis la produkton. Ekzemple, pro faro de plibonaj muldiloj, la produkto de pelvetoj pliiĝis dekoble. La laboristoj ankaŭ eltrovis la "viol-oran" glazuron, kies sekreto oni perdis jam antaŭ cent jaroj.

Sin trovas nun 63 bakfornoj kaj 1126 muldejoj kaj pli ol 12,000 laboristoj. La produkto en 1950 atingis rekordon de pli ol 3,000,000 pecoj. Tamen la pliiĝita produkto ankoraŭ ne sufiĉas por la bezono de la nuna postulo.

La porcelanoj de Kingtehĉen, fabrikitaj en kelkcent variaĵoj, estas ĉefe dividitaj en du kategoriojn: ronda formo kaj neregula formo. Al la unua apartenas pelvoj, tasoj, kaj teleroj, plejparte por ĉiutaga uzo. Kaj la dua konsistanta el homaj kaj bestaj figuroj, potoj, vazoj ktp., estas plejparte uzata por dekoracio. Antaŭ liberigo, nur 28 muldaj fabrikoj produktis rondforman porcelanon. Nun, la nombro kreskis ĝis 458. Ĉi tio indikas, ke la porcelana industrio de Kingtehĉen dediĉas pli da atento al servo al la popolo.

Konforme al la bezonoj de grandskalaj nacikonstruaj laboroj en nova Ĉinio, la urbo nun ankaŭ produktas porcelanajn pecojn kiel telefonajn kaj altpremajn izolilojn por la elektra industrio.

Kun la leviĝanta aĉetpovo de la kamparanoj post agrara reformo, la akcelo de enlanda komerco fare de la registaro kaj la disvolviĝantaj merkatoj eksterlandaj, brila estonteco por la porcelana industrio de Kingtehĉen estas certigita.

trad. C. Ĝolabio

(daŭrigo sur p. 62)

# Kiel Ni Traktas la Militkaptitojn

Vang Jen-lin

*Ĉina Volontul-batalanto en Koreio*

Foje, post furioza kontraŭatako ĉe la bordo de Han-Rivero, mi estis asignita eskorti grupon da Usonaj militkaptitoj al la postfronto. Kiam ili eksciis, ke ni estas irontaj norden, ili ekzaltiĝis.

Dum la unua parto de la vojaĝo ni iris sub konstanta bombardado. La kaptitoj, timante ke ili povas esti frapataj, rapidigis sian paŝadon. Sed kelkaj, kiuj estis vunditaj, kaj aliaj, lamantaj pro frostabsceso, trenante la krurojn postsekvis. Ni diris al la grupo, ke ili iru iom pli malrapide, por ke la vunditaj povu ilin sekvi. Kiel ni surpriziĝis, ke ili ne tute volis tion fari, kaj plendante kaj murmurante, ili proponis ke oni lasu la vunditojn zorgi pri si mem. Ke ili mem devas kiel eble plej baldaŭ trapasi la regionon danĝeran, estis la sola afero pri kio ili nun zorgis.

"Malbonsorto de ili mem," unu el la Usonaj soldatoj diris mokante. "Ne ekzistas kialo ke ni devas riski niajn vivojn pro ili."

"Ja vere," alia raŭka junulo eĥis

sian konsenton, "ĉiu por si mem, postvivu la plej taŭga."

"Afero tia ne estas permesata ĉi tie," unu el niaj kamaradoj abrupte sin intermetis. "Da tiaj sensencaĵoj ni ne volas aŭdi pli. Postlasite ili mortus pro frosto kaj malsato, aŭ denove vundiĝus de obusoj."

Ni montris al ili, ke la bombardado ne estas tiel timiga kiel ĝi povus esti, kaj ke ni faros ĉion eblan por ilin sekure kunpreni al la postfronto.

Silentiĝis ilia grumblo, sed ilian sintenadon ili ne ŝanĝis. Kiam iuj vunditaj soldatoj, ne havante sufiĉan forton pluen iri, falis survoje, iliaj kunuloj ekinsultadis, kaj eĉ ilin ekbatis per la piedo senkompate. Ili esperis, ke ni kredeble nun ilin forlasos.

Ni severe riproĉis la personojn, kiuj tiel kondukis, kaj ordonis, ke du korpkapablaj homoj portu po unu vundito. Restis ankoraŭ kvin vunditoj ne prizorgataj. Jen kvar miaj kamaradoj senhezite antaŭenpaŝis kune kun mi kaj ĉiu el ni surdorsigis unu Usonan soldaton. La homo,

kiun mi portis surdorse, subploretis kiel infano. Tiamaniere ni iris dek kilometrojn.

Kelkaj el la usonanoj, kiuj ĵus kondukis tiel malbone, vidante kion ni faris, eksentis honton, kaj duonvoĉe petis pardonon de la vunditoj.

Ĉe iu homplena rivertransirejo, ni kalkulis la kaptitojn kaj trovis kelkajn malaperintaj. Ni maltrankviliĝis pro ili, alveninte al la vilaĝo en kiu ni tranoktis, kiam ili ankoraŭ ne montriĝis. Sed je frua tagiĝo la sekvintan matenon, oni frapetis mian pardonon kaj ĝin ĝentile puŝis malfermeta. Ili estas tiuj malaperintaj kaptitoj, kiuj malrapidis poste kaj devojiĝis. "Ni timis ke ni ne povas ĝisatingi vin," ili diris. Mi klarigis, ke tute egale estas, kiu ajn taĉmento de la Korea Popola Armeo aŭ la Ĉinaj Popolaj Volontuloj ilin trovus. "Ni ĉiuj havas la saman principon: Bona traktado al la militkaptitoj," mi diris.

Dum batalado, ni estas severaj, ni ŝparas al neniu malamiko lian vivon. Sed, tuj kiam li demetas la armilon, tiam li fariĝas militkaptito, kaj estas traktata indulgeme kaj humane.

Ni batalas por justeco, ni havas nenian kaŭzon por fari vengon. La traktado al militkaptitoj estas afero serioza, kaj kiam iu volontulo estas rekomendata por ordeno, lia rekordo pri traktado al militkaptitoj nepre estas esplorata. Ĝi estas rigardata kiel parto de meritaĵo en milito, tute same kiel heroeco kaj braveco sur batalkampo.

Ni jam provizis la militkaptitojn per hospitaloj, necesaj medicinaj prizorgoj kaj ankaŭ per diversaj distroj aŭ amuzajoj. Ili povas laŭvole skribi leterojn al siaj familianoj. Ni jam konstruis por ili kontraŭaeratakajn ŝirmilojn por protekti ilin de bomboj fajetataj de iliaj propraj aeroplanoj. Eĉ malgraŭ tio ke ĉe la fronto kelkfoje ni mem ne havas sufiĉe da manĝaĵo, tamen al la ĵus prenitaj kaptitoj ni disdividas niajn porciojn. Multaj el ili estas profunde emociitaj de la sincera amikeco kiun ili trovis, kaj publike esprimis sian dankemon al la koreoj kaj ĉinoj pro la bona trakto kiun ili ricevis.

Tradukis Ju Fukango

## Heroinoj sur la Korea Fronto *(daŭrigo de p. 61)*

antaŭ malpli ol unu monato. Poste ŝi estis vundita en aeratako, sed ŝi tute ne plendis. Kontraŭe, ŝi laboris kun pli da entuziasmo. Kelkfoje ŝiaj kunlaborantoj demandis ŝin pri ŝia infano. Ŝi trankvile respondis: "Ĉu estus patrino kiu ne amas sian infanon? La kialo de mia alveno al Koreio por kontraŭbatali la Usonajn agresantojn estas protekti mian propran infanon kaj la infanojn de milionoj da aliaj patrinoj."

Multaj heroinoj jam faris sian plej altan sinoferon por la kaŭzo de korea libereco. La delegitoj diris al ni pri iu deknaujara knabino, membro de la Novdemokratia Junula Ligo, kiu perdis siajn ambaŭ gambojn dum severa bombardado. Ŝi admonis siajn kamaradojn ne elporti ŝin sur brankardo tra la intensa malamika pafado kaj eĉ provis forruli la brankardon, dirante: "Vi ĉiuj estas sanaj kaj utilaj homoj. Ne endanĝerigu vin mem pro mia kaŭzo." Kiam ŝiaj kamaradoj sukcesis transporti ŝin tra la kanonado, ŝi sangadis ĝis morto. Kiam ĉi tiu malĝojiga novaĵo

estis sciigita al ŝia patrino, ŝi skribis al tiuj kiuj kunbatalis kaj kunlaboris kun ŝia filino: "Mia filino jam donis sian vivon. Mi ja multe ĉagreniĝas, sed mi ne ploras. Ŝi oferis sian belan vivon por la kaŭzo de paco. Mi sentas min fiera pro tio ke mi edukis tian filinon kia ŝi."

La letero estis ricevita kaj legata post tago de furioza batalado. Profunde kortuŝite, la homoj rememoris la knabinon kiel ili lastfoje vidis ŝin, kuŝanta sur la brankardo. Tiam iu diris kviete: "La patrino estas heroino; jen estas la kaŭzo kial ŝi edukis tian heroan filinon!" Alia batalanto aldonis: "Nia nacio estas heroa nacio. Tial ni havas heroajn virinojn!"

Ĉinio estas fiera pri siaj filinoj defendantaj sian amatan landon. Kiel tiaj kurageguloj povas aperi inter nia popolo? La nura respondo estas: liberigo elvokis senrezerve ĉion kio estas bona kaj brava en ili. Revolucia optimismo kaj kuraĝo nun karakterizas la virinojn de nova Ĉinio.

Trad. Cipao Nin.



# Pliprodukto Kaj Ŝparo

## Vojo Al Industriigo

Sung Sau-ven

La ĉina popolo, jam preninte ŝtatpotencon en siajn manojn, nun preparas por komenci la unuan plenan ekonomian planon por la konstruo de sia lando. Ĉi tiu plano probable inaŭguriĝos en la fino de ĉi tiu jaro, kiam la tri jaroj da prepara laboro kiu komenciĝis je la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko sukcese plenumiĝos.

La plano komencos la transformon de Ĉinio el agrikultura en industrian landon. Ĝi ankaŭ helpas konstrui la nacian defendon por repeli ĉiujn imperiistajn atencojn de agreso, tiel provizante sekurajn kondiĉojn por la granda tasko de paca konstruo.

Unu el la necesaj kondiĉoj por industriigo en iu ajn lando estas la akumulo de kapitalo. Nature, ankaŭ por Ĉinio estas tio necesa. La ĉina popolo, en la pasintaj du jaroj kaj duono, luktis kun la problemo sukcese.

La akumulo de kapitalo en Ĉinio iras la vojon antaŭiritan de la Lando de Socialismo, adaptitan al la situacio de la nova demokratio. La ĉefaj fontoj de kapitalo estas la konstanta pliiĝo de produkto kaj la praktiko de ŝparo, por tiel krei novan riĉon por la nacio.

La novdemokratia metodo de kapitalakumulo, baziĝante sur internaj rimedoj kaj egala internacia komerco, estas plene en akordo kun la intereso de ambaŭ ĉina popolo kaj popoloj de la mondo. Plue, ĝi ja helpas kaj firmigas la aferon de mondpaco.

Pro la venko de la popola revolucio en Ĉinio kaj siaj frataj rilatoj kun Sovetio kaj la Popolaj Demokratioj, la ĉina popolo povas firmiĝe antaŭeniri laŭ la nova vojo. Sub ĉi tiuj cirkonstancoj Prezidanto Maŭ Ze-tung deklaris en sia parolado al la Popola Politika Konsiliĝa Konferenco je la 23a de oktobro, 1951, ke la kampanjo pliiĝi produkton kaj praktiki ŝparon estas unu el la centraj taskoj de la ĉina popolo nuntempe.

### Leviĝas Laborproduktivo

La plej grava garantio de sukceso en la kampanjo kuŝas en la fakto, ke la laboristoj de Ĉinio entuziasme adoptis ĝin kiel sian propran aferon. La laborista klaso, la gvidanta klaso de la nova demokratio, jam havas grandajn atingojn en pliprodukto per pli alta produktivo de laboro kaj enkonduko de ekonomiaj rimedoj.

Karboministoj en Nordorienta Ĉinio, per plibonigitaj teknikoj kaj pli bona organizado de la laborprocedo, produktis duoble tiom da karbo en 1950 kiom en 1945.

Per rimedoj de raciigo kaj ŝparo, pakistinoj de elektraj baterioj en Sinhua-Baterifabriko en Kantono kreis 2,500 milion juanojn da ekstra riĉaĵo por la ŝtato en du monatoj. Ankaŭ en Kantono, laboristoj de la Kuangtung-Cementfabriko pliiĝis la ĉiu tagan produkton de ĉiu forno je 43 tunoj. La teamo servanta fornon N-ro 3 produktis 2,000 milion juanojn da ekstra riĉaĵo per daŭra funkciado de la forno dum 238 tagoj sen ajna akcidento.

En la fabriko de la Ŝanhaja Fervoja Administracio, metallaboristoj forĝis novajn metaltrabojn el ŝtalrubo,

ŝparante 12,000 milion juanojn por la registaro. Iu Ŝanhaja lokomotiva teamo estrata de Ma Ŝu-ĉeng kreis novan rekordon, kurante 250,000 kilometrojn en 884 tagoj sen ajna akcidento aŭ paneo. Akcidentoj en la aferoplenaj fervojstacioj de Ŝanhajo, antaŭe tre oftaj, preskaŭ tute eliminiĝis per aplikado de sekuraj procedoj elpensitaj de modellaboristo Huang A-lin.

La 17-jara modela teksistino Ho Kien-ŝiu en Cingtaŭ kiu sukcesis malaltigi la proporcion de kotono malŝparata en ŝpinado sur la spindeloj kiujn ŝi prizorgas de 1.5 procentoj ĝis 0.25 procentoj. Ŝia metodo estas enkondukita kiel normo tra tutlanda teksa industrio. Kiam universale uzata, ĝi pliigos la jaran produkton je 44,460 pakajoj da ŝpinaĵo aŭ 64 milion jardoj da ŝtofo sen speso da ekstra investo en maŝinoj aŭ krudaj materialoj.

La ekzemplo de Ho Kien-ŝiu montras la eksterordinaran ekonomian gravecon de la inventoj kaj proponoj kiujn la laboristoj, kiel mastroj de la lando, estas nun elpensantaj. Entute 24,875 efektiviĝis sole en la jaro 1950. Sciencistoj kaj teknikistoj konstante studas kaj ekzamenas proponojn faritajn de la laboristoj, konsiliĝas kun iliaj iniciatintoj kaj disvolvas aŭ kombinas iliajn trajtojn en novajn normajn procedojn por tutaj industrioj.

Mi citis nur malmultajn ekzemplojn por montri kiel la politike konsciaj ĉinaj laboristoj konstante produktas pli por la lando. Ili ne nur pliiĝas sian propran produktivon, sed partoprenas aktive en produkta planado kaj en garantiado ke planoj estu plenumitaj aŭ superplenumitaj.

### Pliiĝas Rikoltoj

En la vasta kamparo, kie la produkta forto de centoj da milionoj da kamparanoj jam liberiĝis el feŭdaj katenoj per la agrara reformo, antaŭaj rekordoj de agrikultura produkto estas rompataj en rapida sinsekvo.

Kuo Jun-ŝiang, kamparano de Ŝjuŝuj-Gubernio, Ho-pej-Provinco, rikoltis 455 kilogramojn da milio po muo lastjare. La fama laborheroo Li Ŝun-ta, en Ŝansi, atingis po-muan produkton de 490 kilogramoj da maizo. Malgraŭ sekeco kaj inundo en sia regiono en 1951, Li Ven-tung de Vuĉih-Gubernio, Pingjuan-Provinco, atingis meznombro de 272 kilogramoj da tritiko po muo.

Per aplikado de modernaj metodoj en la kulturo de rizo, Ĉen Jung-kang, kamparano en Sungkiang-Gubernio, Kiangsu-Provinco, kreis la rimarkindan rekordon de 716.5 kilogramoj po muo. Ĉen, kiu estas entuziasma partoprenanto en la laboro de la Agrikultura Esplora Stacio en sia loko, estas transdonanta sian scion al siaj najbaroj kaj helpanta publiki sian metodon en aliajn rizkreskigantajn regionojn.

En respondo al la alvoko de la registaro por pliiĝita produkto po hektaro, la modela interhelpa teamo gvidata de Ĉju Jaŭ-li en Ŝienŝien-Gubernio, Ŝansi-Provinco, estas laborinta energie por plibonigi kotonkulturon.

Pli longe ol oni povis memori la popolo de Ĉangŝa babilis pri nova akvo-provizeto. Ili malŝatis tiun staton pri kiu diras malnova loka proverbo: "Dum pluvo ni trinkas el akvo kota, dum sekeco akvo estas kiel oleo kosta." Kuomintango cinike utiligis ilian deziron, starigis "Komitaton por Akvo-provizeto", kolektis 2,000,000,000 juanojn por plenumi konstru-laboron—kaj poste faris nenion. Sed hodiaŭ Ĉangŝa jam posedas sian akvo-provizeton. Decidinte doni rapide puran akvon al la urbo kie Prezidanto Maŭ pasigis la unuajn jarojn de sia revolucia historio, la inĝenieroj kaj spertaj laboristoj tra la tuta urbo alvenis por helpi ĝin konstrui. Dum laboro ilia entuziasmo plialtiĝis pro la kampanjo rezisti Usonan agreson kaj helpi Koreion kaj la ĉiutaga instalado de ĉeftuboj plirapidiĝis de 45 metroj ĝis 185 metroj. La konstruado komencis en decembro 1950 kaj plenumiĝis post dek monatoj kaj en la Nacia Tago, la 1-a de oktobro, 1951 freŝa akvo komencis flui el la tuboj. Ĉangŝa nun havas akvon taŭgan por trinkado kaj kranajn kaj hidrantojn\* kiuj malpliigas la danĝeron de fajrego. Unu el la sonĝoj de la popolo jam realiĝis.

Antaŭ la liberigo estis malmultaj trafikiloj en Ĉangŝa kaj la veturkostoj estis tre altaj. La transport-laboristoj estis ekspluatataj kvazaŭ brutoj. Tie sur la dokoj la diferenca sumo inter la kosto pagita de la publiko kaj la mizera enspezo de la laboristoj falis en la poŝojn de la ĉefoj de kontrakt-bandoj kiuj havis tradiciajn rilatojn kun kontraŭ-revoluciaj elementoj. En la printempo de 1951 la popolo decidis forpeli tiujn friponaĉojn kaj granda kunveno de 130,000 homoj okazis por iniciati la kampanjon. Rezulte de tio la bandoj estis frakasitaj kaj iliaj ĉefoj estis alkondukitaj al la juĝejo.

Nun transportado estas ne nur liberigita el tiuj parazitaj sed ankaŭ faciligita per la konstruado de nova digo laŭlonge de la rivero. La digo estas 7,000 metrojn longa kaj 60 metrojn larĝa, anstataŭanta tiujn naŭzajn arojn da kadukaj dometoj kie kunpremiĝis 3,000 ekstreme malriĉaj familioj. La iamaj kunpremitaj loĝantoj jam akiris laboron aŭ teron; tiuj kiuj ne iris kulturi la teron donitan al ili loĝas en 600 novaj domoj konstruitaj de la registaro. La bordo de la rivero estas scenejo de konstanta aktiveco. Pli da varoj interfluas kaj la transport-laboristoj gajnas pli altan salajron. Laŭlonge de la digo du novaj ŝoseoj kaj unu promenejo estas konstruitaj kaj sur ili arboj estas plantitaj. Kiam la popolo de Ĉangŝa promenas tie sur la promenejo, ili povas vidi la acerojn sur la Jolo-Monto, la velojn sur la Ŝiang-Rivero kaj la preterpasantajjn ŝarĝaŭtojn plenigitajn per greno, rizo kaj kotono.

Ĉangŝa ankaŭ posedas novajn pramojn. Ne estas plu necese trapasi la riveron per balanciĝantaj senŝirmaj boatoj sen ajna protekto kontraŭ vento, kaj pluvo. Komfortaj, verdaj pramoj komencis veturi sur la Ŝiang-Rivero en la 1-a de oktobro, 1951, en la sama tago kiam la urbo ekhavis sian akvo-provizeton. Tio estas alia el la bonfaroj pro kiuj la popolo de Ĉangŝa dankas la Komunistan Partion kaj Prezidanton Maŭ.

## Urbo por la Popolo

Ĉangŝa estas fariĝanta pli verda. Laŭlonge de la stratoj estas nun 65,000 novaj arboj. Sep milionoj da

arbidoj estas plantitaj en 12-hektara areo en la urbo. En la pasinta printempo post la agrara reformo, la popolo de la okcidenta antaŭurbo kunlaboris kun la registaro kaj plantis pluajn kvin milionojn da arboj, en tiu regiono. Antaŭ nelonge malfermiĝis parko por infanoj kie estas ludejoj kaj bibliotekoj. Dum konstruado la gelernantoj preterpasantaj kutime diris al la laboristoj: "Bonvole rapidu. Ni volas eniri kaj ludi." Nun la granda standardo super la pordego legiĝas: "Eduku la junan generacion."

Antaŭ la malnova sidejo de la Unua Instruista Kolegio kie Prezidanto Maŭ iam studis, la nova Nanĉang-Strato estas finkonstruita. Laŭlonge de tiu strato oni povas vidi multajn belajn domojn inter kiuj estas trietaĝa hospitalo. Alia ĉefa arterio, la Unuamaja Strato, estas ankoraŭ konstruata, sed venas jam postuloj pri ĉiuj neokupitaj terspacoj laŭlonge de tiu strato, elmontrante la novan komercan prosperon de la urbo.

En la kampo de kulturo la popolo ankaŭ faras grandan progreson. Antaŭ la liberigo estis 13,316 lernantoj en la elementaj lernejoj de Ĉangŝa—nun estas 35,714. En la pasinteco la lernejoj estis nur por la gefiloj de la privilegiitaj klasoj. Nun 37.6 procentoj de la lernantoj estas gefiloj de laboristoj kaj terkulturistoj kaj la proporcio tiurilata ĉiam pli grandiĝas. Koncerne edukadon por plenaĝuloj, 14,000 laboristoj kiuj antaŭe ne havis ŝancon por lerni nun vizitas libertempajn lernejojn. Kelkaj novaj profesiaj institutoj estas ankaŭ starigitaj.

Mez- kaj alt-gradua edukado en Ĉangŝa ne plu subiĝis al la influo de imperiistoj. La iama medicina kolegio "Yale-en-Ĉinio" kiu estis multe influata de Usonaj imperiistoj nun estas la Nacia Ŝiangja-a Medicina Kolegio. La rilata Jali-Mezlernejo estas nun la Liberiga Mezlernejo. En tiuj du edukejoj la lernantoj lernas kiel ili povas servi al sia propra popolo sed ne al la imperiistoj.

La popolo de Ĉangŝa decidas ke la imperiistoj ne plu etendu siajn palpilojn en la urbon. Ili ankoraŭ tenas amaran memoron pri la pasinteco. Ili saĝe prenis lecionojn el la akcidentoj kiuj okazis en ilia urbo eĉ post la liberigo. (Antaŭ nelonge Usona "misiisto" estis kaptata dum li provis kontrabandi altvalorajn ĉinajn antikvaĵojn for de tiu ĉi lando.) Por garantii ke nenio malhelpu ilian novan vivon, dek miloj da gejunuloj de Ĉangŝa aliĝis al la lernejoj por milit-kadroj deponitaj la komenco de la korea milito.


Du jaroj sufiĉas por montri al la popolo de Ĉangŝa ke nur sub la gvidado de la Komunista Partio ili povas repreni la urbon en siajn manojn kaj ĝin rekonstrui kiel hejmon. Ankoraŭ multon ili devas fari kaj ili faras tion. Vivante en la plej glora periodo de ĉina historio, ili faros sian urbon en monumenton por tiu epoko kiam ilia granda patrio estas liberigita kaj fariĝas fortika—la epoko de Maŭ Ze-tung.

I. K.

\* Tuboj fiksitaj sur tero kaj kuniĝantaj kun ĉefaj subteraj akvotuboj kaj per ili oni havigas al si akvon por estingi fajregon aŭ por alia celo.



La unua vagonaro  
de Neĵkiang al  
Ĉungking trapasa  
Mejjaŭ-Ponton.





Unu el la obstakloj renkontitaj kaj konkeritaj en konstruado de la fervojo.

## La Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo

La plej nova fervojo 530 kilometrojn longa interligos du el la plej gravaj urboj de Sudokcidenta Ĉinio, Ĉengtu kaj Ĉungking. Ĝi estis unue planita antaŭ 40 jaroj, sed la fondusoj por ĝia konstruado estis aŭ forŝtelitaj aŭ miselspezitaj de la reakciaj registaroj kaj oficistoj, kaj eĉ ne unu metro da relvojo estis konstruita. Komencite de la Popola Registaro en junio, 1950, la unua sekcio 284 kilometrojn longa de Ĉungking ĝis Neĵkiang estis antaŭdate kompletigita je la 7a de decembro, 1951.

Teknikistoj el Ŝanhaja kaj Nordokcidenta fervojburooj helpantaj la konstruadon diskutas pri la planoj por la konstruado de la Tokiang-Ponto.





Leviĝas la pontokolonoj por la ponto super la Ŝouĉi-Rivero.



La unua lino estas e



Miloj da kamparanoj penlaboras por konstrui la vojfundamenton.



La unua vtrapasas la




Laboristoj legas sian propran jurnalon, *La Konstruantoj de Fervojo*.






Motivo por la nova  
gata ĉe Ĉungking.



Popolamasoj kunvenas por gratuli la unuan vagonaron ĉe Jungĉuan-stacio.

## Konstruado de la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo

Je la plej granda rapideco al la estonteco! Junaj pioniroj  
portas bukadojn kaj standardon por la konstruantoj de la fervojo.



Maro al Nejkjano  
pletigitan Tokiang-  
nton.







Modela flegistino Ĉang Kian - teh flegas vunditon kiun ŝi savis el domo brulanta pro Usona bombado.

Spite de la bombado kaj maŝin-pafado de Usonaj aeroplanoj la heroaj batalantinoj transportadas manĝaĵon trans la blokad-linion.

# Ĉinaj Heroinoj sur la Korea Fronto



La batalantinoj ĝoje kantas dum ripozado por baldaŭ ekagi kun refreŝigita forto.

Antino de literatur-artista korpuso kant-rakontas al la volontuloj en kontraŭaerataka ŝirmejo ĉe la fajrlinio.





# KUO MO-JO—BATALANTO POR PACO

— Jang Ju —

Kuo Mo-jo estas fame konata pro sia netimigebla spirito, sia brila oratorarto, sia plumo tranĉema kiel glavo. Jen al tiu ĉi revolucia poeto kaj sindona batalanto por paco kaj demokratio estas aljuĝita la Internacia Stalina Pacpremio de 1951. La aljuĝo estas aklamita de la tuta ĉina popolo kaj la pacamantaj popoloj de la mondo.

Kuo Mo-jo naskiĝis en la jaro 1892 en malgranda urbeto proksime de Omej-Monto apud la Tatu-Rivero en Seĉuan-Provinco. Filo de komercista familio rilatiganta kun kleruloj, li plej bone utiligis la oportunojn por akiri vastan scion pri ĉinaj klasikaj verkoj. Tio formis la bazon por lia profunda kompreno de antikva ĉina kulturo. Je la aĝo de 12 jaroj, li unue kontaktis kun moderna okcidenta penso. Je la 20-jara aĝo li forlasis sian naskiĝan urbeton por studi en Japanio. Lia sperto de la malnova socio en Seĉuan donis al li praktikan komprenon kiel feŭdismo malhelpas la progreson de Ĉinio kaj faris ĝin viktimo de la imperiistoj. Ekde la tempo kiam li turnis la dorson al la kadukanta socio kaj ĵetis sin en la revolucion movadon li ĉiam restas senkompata kontraŭulo al feŭda reakcio.

Samkiel sia granda samtempulo Lu Sin, Kuo Mo-jo studis medicinon kaj gradiĝis el japana medicina lernejo, sed surdeco malhelpis lin praktiki sian profesion. Influite de la verkoj de Goethe, Heine, Turgenev, Whitman kaj, super ĉio, inspirite de la 4a-maja Movado, 1919, kiu markis la komencon de la novdemokratia revolucio en Ĉinio, li komencis sian novan karieron kiel verkisto. Reveninte el Japanio en la jaro 1926, li fondis la poste famkonatan Kreo-Societon kaj publikigis la semajnan gazeton "Kreo" kaj multajn aliajn progresemajn verkojn. La kolekto de liaj poemoj "La Diino", lia dramo "Tri Ribelaj Virinoj" kaj kelkaj romanoj, romantikaj en stilo, elmontris riĉan fonton de amo por la homaro kaj donis trafajn frapojn al la malnova socia sistemo. Ili inspiris multajn junajn ĉinojn ekiri la vojon de la revolucio.

Kuo Mo-jo skribis en sia aŭtobiografio, "Mi kredas ke mi profunde amas mian patrolandon. Mi studis medicinon por akiri iom da praktika scio utila por servi al la popolo. Mi laboris en la kampo de literaturo, ĉar mi volis inspiri homojn ŝanĝi la mondon.... Tamen, unue mi sciis tre malmulte pri la nova socio aŭ kiel ĝi devas esti konstruata."

Poste, okazis la Oktobra Socialista Revolucio. Ĝia brilo lumigis la Orienton. Ĝi helpis la junan Kuo Mo-jo-n kompreni pri la naturo de la nova socio por kiu ni ĉiuj strebas. Frue en la jaro 1924, li komencis serioze



studi Marksismen kaj tio estigis la radikalan transformon de lia penso kaj vivmaniero. Li ludis aktivan rolon en la Unua Revolucia Civila Milito (1924-1927) dediĉinte sin al politika kaj kultura laboro kontraŭ la militaristoj dum la Norden-Ekspedicio. Li partoprenis la Nanĉang-Ekleviĝon de la Unua de Aŭgusto, 1927, la ekleviĝo kiu naskis la Ĉinan Ruĝan Armeon, la embrion de la Popola Liberiga Armeo. Por malkaŝi la perfidon de Ĉiang Kaj-ŝek al la revolucio, li skribis sian broŝuron "Rigardu al Hodiaŭa Ĉiang Kaj-ŝek!"

La reakcia Kuomintang-registaro anoncis premion de 30,000 arĝentaj dolaroj por la kapo de Kuo Mo-jo. Li estis devigata vivi en ekzilo.

Dum la sekvintaj dek jaroj kiujn li pasigis en Japanio, Kuo Mo-jo estas konstante sub la observado de la japana polico. Li daŭrigis sian esploron en antikvan ĉinan

historion, farante penegan studon de la hieroglifoj sur la antikvaj bronzaĵoj kaj orakolaj ostoj kiuj estas riĉaj en historia signifo. Li tradukis "Kritiko de Politika Ekonomio" kaj "Germana Ideologio" de Karlo Marks kaj "Milito kaj Paco" de Leo Tolstoj kaj multajn aliajn mond-famajn romanojn.

Kiam la Rezistmilito kontraŭ Japana Invado komenciĝis en 1937, Kuomintang, malgraŭ sia malsincereco kaj malvolo, estis devigata de la premo de la popolamaso, partopreni en la Kontraŭ-japana Unueca Fronto. Kuo Mo-jo revenis tuj al sia patrolando kaj ĵetis sian tutan energion kaj talenton en la batalon kontraŭ la invadantoj kaj iliaj pupaj kunagantoj.

Tra la tuta Kontraŭ-japana Milito, Kuo Mo-jo batalis brave kaj firme kontraŭ la kontraŭ-demokratia kontraŭ-komunista kaj malvenkista politikoj de Ĉiang Kaj-ŝek. Rezulte, kiam la ekstremaj reakciuloj fariĝis superegaj en Ĉungking, la tiama milittempa ĉefurbo, li estis tenata efektive kiel malliberigito tie, sed li daŭre luktis por demokratio kaj la popola milito kontraŭ invado, sub lia gvido, je la 27a de februaro, 1945, pli ol 370 kultur-laborantoj en Ĉungking subskribis deklaron alvokantan por demokratia koalicia registaro. Tio estigis grandan influon inter la popolanoj tiam sub la Kuomintanga regado. Ĝi ekscitis la tutan venenan malamon de la reakciuloj. Monaton poste, Ĉiang Kaj-ŝek malorganizis la Komitaton de Kulturlaboro kiu estis patronata de Kuo Mo-jo, ĝuste kiam ĝi estis rememoriganta la morton de la granda verkisto kaj batalanto por progreso—Romain Rolland.

Kuo Mo-jo denove prenis sian plumon kiel la ĉefan armilon en la lukto kontraŭ reakcio. En historia

dramo li protestis kontraŭ la Kuomintanga tiraneco per laŭdo de la heroismo de Ĉju Juan, patriota poeto de antikva tempo. Tiu ĉi kaj kvar aliaj dramoj injektis novan kvaliton en la samtempan arton kaj vigligis ĉiujn progresemlulojn, precipe verkistojn en la regionoj sub la regado de Kuomintango.

En junio, 1945, je la invito de la Sovetunio, Kuo Mo-ĵo partoprenis la 220an datrevenon de la Akademio de Sciencoj de la U.S.S.R. Dum sia 50-taga restado en la U.S.S.R., li vizitis Leningradon, Stalingradon, Uzbekistanon kaj multajn aliajn lokojn. Per tiu ĉi vizito Kuo Mo-ĵo komprenis ankoraŭ pli klare kion la venkoj de socialismo signifas. Lia libro, "Vojaĝo en la U.S.S.R." vive priskribis la ĝojan vivon de la Sovetia popolo. La libro elvenis el la presejo je la oportuna momento kiam Kuomintang kaj ĝiaj imperiistaj mastroj rekomencis sian sovaĝan kontraŭ-sovetian propagandon.

Kuo Mo-ĵo revenis al Ĉinio en aŭgusto, 1945. Malfrue en tiu jaro la Ĉiu-partia Politika Konsiliĝa Konferenco komenciĝis sub la premo de la popolo kiu energie opoziciis la intrigon de Ĉiang Kaj-ŝek lanĉi novan kontraŭ-revolucian civilan militon. Senhezite, Kuo Mo-ĵo kaj kelkaj aliaj liaj kunbatalantaj kamaradoj, inkluzive Profesoron Li Kung-pu estis atakataj de Kuomintangaj kanajloj dum ili gvidis la grandan amaskunvenon en Ĉungking kiu celebris la okazigon de tiu ĉi konferenco kaj ĝia laboro por nacia paco. Tio okazis la 10an de februaro, 1946. Ne longe poste, ambaŭ Li Kung-pu kaj Ven I-to, unu el la plej brilaj revoluciaj poetoj de Ĉinio, estis murditaj de Kuomintangaj sekretaj agentoj en Kunming, Junnan-Provinco. En majo tiujare, Kuo Mo-ĵo foriris al Ŝanhajo kie li batalis ŝultro-ĉe-ŝultre kun studentoj kaj aliaj demokrataj elementoj kontraŭ la reakciuloj kaj la Usonaj imperiistaj instigantoj de nova civila milito kaj interveno. En novembro, 1947, kune kun aliaj patriotoj li iris al Hongkong.

Dum tiuj jaroj, kiel Kuo Mo-ĵo mem diris, vivo estis samkiel "la fluo de la Tatu-Rivero, serpentumanta en la altaj monto-valoj." Sekve venis la tempo de la epok-faranta liberiga movado de la popolo kiam la rivereto ligiĝis kun la amasmaro.

Kuo Mo-ĵo restis en Hongkong ĝis novembro, 1948, kiam Ŝju-ĉoŭ estis liberigita kaj Nankino, la centro de la despoteca regado, estis senŝirmigita kontraŭ la armitaj fortoj de la popolo. Li tiam iris al la Nordorienta liberigita regiono, kaj tuj partoprenis la politikajn kaj sociajn agadojn de nova Ĉinio. En septembro, 1949, li diris ĉe la Unua Plena Kunsido de la Ĉina Popola Politika Konsiliĝa Konferenco de kiu li estis membro, "Ni nepre devas esti por ĉiam unuigitaj, agente en interkonsento kun la Ĉina Kompartio kiu servas la popolon tutkore. Sub la elstara gvidado de Prezidanto Maŭ, ni devas ĉiel penadi por disvastiĝo de patriotismo kaj patriota internaciismo de la Nova Demokratio, ni devas strebi eĉ pli energie por plenumo de la tasko liberigi la tutan landon por ke la liberigo de la tuta homaro estu pli rapidigita."

Kiam la Popola Respubliko de Ĉinio estis starigita, Kuo Mo-ĵo estis elektita al la jenaj postenoj: membro de la Centra Popola Registara Konsilo, vic-ĉefministro de la Registara Administra Konsilo, prezidanto de la Komisiono por Kulturaj kaj Edukaj Aferoj kaj prezi-

danto de la Akademio Ĉinia. Samtempe, li estis elektita prezidanto de la Tut-Ĉinia Federacio de Verkistoj kaj Artistoj kaj vic-prezidanto de la Ĉinia-Sovetia Amikeca Asocio.

Kuo Mo-ĵo estis kaj estas firma batalanto por defendo de mond-paco. En aprilo, 1949, li estris la Ĉinan Delegitaron al la Monda Pac-Kongreso okazigita samtempe en Praha kaj Parizo. Re prezentante la ĉinan popolon, li kondamnis la krimulajn milit-instigantojn sub la gvido de la Usonaj imperiistoj kiuj komplotas por nova milito. Li diris al la tuta mondo pri la deziro kaj decidemo de la ĉina popolo defendi la mondpacon. Tiu ĉi garantio je la nomo de 475,000,000 liberigitaj polojanoj donis gigantan altigon de memfido al pacamantaj popoloj de la mondo.

Kuo Mo-ĵo estis elektita unu el la vic-prezidantoj de la konstanta komitato de la Kongreso. Reveninte, li diris al centoj da miloj da scivolaĵ bonvenigantoj pri la Kongreso, ĝiaj celoj kaj atingoj. Li estis elektita prezidanto de la Ĉina Paco-Komitato kiam ĝi fondiĝis en oktobro 1949. Li plufoje gvidis la Ĉinan Delegitaron al la dua kunsido de la Monda Pac-Kongreso en Varsovio kaj estis elektita unu el la vic-prezidantoj de la Administra Buroo de la Monda Pac-Konsilo.

Je la 25a de junio, 1950, la Usonaj imperiistoj invadis Nordan Koreion. Kuo Mo-ĵo, per paroladoj kaj artikoloj, esprimis la grandan indignon de ĉiuj ĉinoj je la bruta ago de invado. Li estris la Ĉinan Popolan Komisionon al batalanta Koreio en aŭgusto por ĉeesti la celebron de la kvina datreveno de la liberigo de la korea popolo el la jugo de Japanio. Tiu ĉi Komisiono portis la simpatian de Ĉinio al la armitaj fortoj kaj la popolanoj de Koreio, kiuj batalas heroe kontraŭ la Usona invado. Ĝi portis simpatian kaj helpon al viktimoj de la invadantoj. Laŭ siaj spertoj en Koreio, Kuo Mo-ĵo verkis serion da artikoloj sub la titolo "Vizito al Koreio".

La anonco de la listo de laŭreatoj de la Internacia Stalina Pacpremio de 1951 koincidis kun la hejmenreveno de Kuo Mo-ĵo el la kunsido de la Konstanta Komitato de la Monda Pac-Kongreso en Vieno. La popolanoj tra tuta Ĉinio estas fieraj je ĉi tiu grandioza internacia honoro donita al Kuo Mo-ĵo, elstara socia kaj kultura laboranto kaj longe-elprovita batalanto por paco. Kuo Mo-ĵo diris je sciigo pri la aljuĝo, "Tio estas granda honoro al mi sed la merito de tiu ĉi honoro nepre apartenas al la popolo de la tuta lando." Speciale celebri en Pekino esprimis la gratulojn de la tuta popolo. Komunikaĵoj el ĉiu tavolo de la popolo alflugis al li, promesante multoblighi sian penadon en defendo de paco.

Firme fidante al la popoloj de la mondo, Kuo Mo-ĵo plene kredas je la venko de la lukto por paco. Kiel li diris ĉe la Dua Kunsido de la Monda Pac-Konsilo, "La vojo al paco estas la vojo de la popolo, la vojo de frateco, reciproka ekonomia helpo kaj kultura interŝanĝo. Tiu ĉi vojo estas malfermita al ĉiuj honestaj homoj kiuj vere servas al la prospero de la homaro.

"Ni estas firme konvinkitaj ke paco certe triumfos super milito."

Trad. Censinio.



## Batalo kontraŭ Bakteria Milito

Koleraj protestoj leviĝis tra tuta Ĉinio post la apero de la unua raporto pri la krimago de Usonaj agresantoj uzi bakterian armilon en Koreio. La Ruĝkruca Societo de Ĉinio, sciencistoj, sindikatoj, medicinaj kaj edukaj laborantoj ĉiuj denuncis la krimon. Ĵurnaloj tra la tuta lando aperigis dum la pasintaj kelkaj semajnoj multajn leterojn de popolanoj en ĉiuj vivsferej esprimantaj ilian indignon.

Je la 25a de februaro, la prezidanto de la Ĉina Pac-Komitato, Kuo Mo-ĵo kable sendis apelacion al Frederic Joliot-Curie, prezidanto de la Monda Pac-Konsilo, por alvoki pere de li al la pacamaj popoloj tra la tuta mondo urĝe agadi kontraŭ la bakteria milito de Usono.

Responde al la apelacio, la Monda Federacio de Sindikatoj, la Pola Ruĝkruca Societo kaj la Vietnamia Ĝenerala Federacio de Laboristoj jam sendis kablodepeŝon al la Unuigitaj Nacioj, la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, kaj la ĉefsidejo de la Ligo de la Ruĝkrucaj Societoj, petante ĉi tiujn organizojn ekpreni urĝajn rimedojn por malebligi ripeton de tia krimago de bakteria milito.

La unua grupo de ĉina kontraŭpesta korpuso jam flugis de Pekino al Koreio je la 29a de feb., por helpi koreajn medicinajn aŭtoritatojn kontraŭbatali bakterian militon. La grupo, formiĝinta en tri tagoj responde al urĝa alvoko de la Landa Medicina Asocio de Ĉinio, konsistas el bakteriologoj kaj specialistoj en entomologio, patologio kaj epidemia kontrolado.

## Agrikultura Plano por 1952

Ĉinio jam adoptis sian agrikulturan planon por 1952. La tuta agrikultura produkto ĉi-jara almenaŭ atingos la plej altan nivelon antaŭ la Kontraŭjapana Milito. La ĉefaj klopodoj estos direktataj al pliigo de po-hektara produkto. Cereala produkto estos pliigita je 8% kaj kotona produkto je 20% super la ciferoj de 1951.

La produktoplano de la registaro ankaŭ postulas pliigi dombestojn kaj aliajn produktajn inkluzive de teo, silko kaj fruktoj.

Lastjare, la landa cereala produktado atingis 92% de la antaŭmilita plej alta produkto, dum kotonprodukto superis la antaŭmilitan rekordon je 33%. La produkto de dombirdoj, lino, tabako, teo, maraj produktoj kaj vegetaj-oleo aŭ atingis aŭ superis la celojn de 1951.

La ĉefaj klopodoj por pliigi produkton estos direktataj al pliigo de po-hektara produkto per uzo de pli da sterko kaj disvolvo de interhelpaj teamoj, per kompletigo de pli da akvokonservaj projektoj kaj apliko de efikaj rimedoj por malebligi ajnan naturan katastrofon.



Laŭ la plano, 80-90% de la tutlandaj kamparanoj partoprenos interhelpajn teamojn en du aŭ tri jaroj. En Norda Ĉinio sola, la membraro de interhelpaj teamoj kreskos de 55% ĝis 70-80% de la tuta loĝantaro de tiu regiono.

Almenaŭ unu ŝtata farmo starigos en ĉiu gubernio por disvastigi modernajn terkulturajn metodojn. Ĉiu provinco havos fabrikan por produkti plibonigitajn terkulturajn instrumentojn.

## Produkto de Ŝpinaĵo kaj Teksaĵo en 1952

La produkto de kotona ŝpinaĵo en Ĉinio ĉijare superos la antaŭmilitan rekordon de 1930 je 39% kaj superos tiun de 1951 je 28.3%

Kompare kun la cifero de 1951, la produkto de kotona ŝtofo ĉijare pliigos je 28.97%; kanab-sako je 81.5%; kruda silko je 25%; ŝpinmaŝinoj je 300% kaj teksmaŝinoj je 40%.

La produktocelo adoptita je la Landa Tekstindustria Konferenco estas certe atingota rezulte de pliigita kotonprodukto kaj plibonigita tekniko en la teksindustrio.

## 936-paĝa Plena Vortaro Esperanta-Ĉina Reeldoniĝis en Pekino

La Plena Vortaro Esperanta-Ĉina, kompilita de k-do Venlo Fon kaj

unue eldonita en 1944, estas jam de longe ne aĉetebla. Jen ĝi estas reeldonita de la Ĉina Esperanto-Ligo en pli plaĉa vesto. La reeldono de tiel ampleksa libro ja estas neebla sen la finaca helpo de la Ĉina Popola Registaro. Kaj tio ĉi refoje montras al la tutmonda esperantistaro la veron, ke Esperanto povas ricevi subtenon de la popolo kaj rapide disvastiĝi kaj ekflori nur se ĝi fidele servas al la popolo por plifortigi la solidarecon inter la popoloj kaj defendi mondpacon.

Oni povas diri sen troigo ke la 936-paĝa Plena Vortaro Esperanta-Ĉina estas ne nur la plej kompleta vortaro Esperanta-Ĉina, sed ankaŭ la plej vortoriĉa Esperanto-vortaro en la tuta mondo. Ĝi enhavas ne nur ĉiujn oficialajn radikojn, abundajn kunmetitajn kaj derivitajn vortojn, sed ankaŭ preskaŭ ĉiujn neologismojn plej ofte uzatajn en hodiaŭaj esperantaĵoj. Krom ĝustaj tradukoj de ĉiuj Esperantaj vortoj oni trovas en ĝi ankaŭ riĉajn helpivajn ekzemplojn de vortuzo.

La dua eldono de tiu ĉi grava verko alportas al la ĉina esperantistaro—certe ankaŭ al la alilandaj esperantistoj—ne nur grandan ĝojon, sed ankaŭ dankindan helpon. Estas espereble, ke la Esperanto-movado en Ĉinio marŝos pli rapide kaj pli firmaŝe ricevinte freŝan forton el ĝi.

*En la unuaj du volumoj de "El Popola Ĉinio" aperis dekoj da rakontoj kaj poemoj, kiuj vive priskribas la bravan batalon de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, la energian rekonstruadon, la feliĉan vivon kaj la fortan pacovolon de la ĉina popolo. Se vi deziras konatiĝi kun la ĉina popolo, vi nepre legu ilin. Se vi jam ilin foje legis, ĉu vi ne volas ilin posedi en oportuna libroformo?*

## Jen Jus Aperis

Por Nova Afero, Nova Maniero, 196-paga kolekto de noveloj el **El Popola Ĉinio**. Ĝi kostas kiel tri numeroj de **El Popola Ĉinio**.

La Plej Forta Voĉo de la Paco, 56-paĝa kolekto de poemoj el **El Popola Ĉinio**. Ĝi kostas kiel 1 numero de **El Popola Ĉinio**.

Mendu ilin ĉe nia administracio aŭ perantoj!

# Propono de la Tria Distrikto

Ku Ju

## Ĉapitro I

Estis aŭtuno. Alblovis malvarma vento; ĝi blovis en la ĉambron de Laŭ Ĉing kaj malordigis la paperojn sur la tablo. Li turnis sin tien kaj ĉi tien por kapti la forflirtantajn slipojn.

“Malordiganto! ili jam estis malordaj eĉ sen via enmiksiĝo!” li murmuris.

En tiu momento Ŝang-ven flankenpuŝis la pordokurtenon kaj enpaŝis, demandante:

“Kiu estas la malordiganto, oĉjo?”

“Jen la vento,” diris Laŭ Ĉing, forviŝante la ŝviton de sia frunto. “Mi ne komprenas, de kie venis tiu ĉi stranga vento. Ju pli mi ne povis ilin ordigi, ĝi des pli profitis mian embarasan situacion!”

“Kial vi ne vokis min, se vi ne povis ilin ordigi?” diris Ŝang-ven.

“Mi vokis, sed vi forestis, kiu ja sciis kien vi iris! Rapidu! Tiuj ĉi estas pri eduko kaj publika higieno, tiuj pri geedziĝaj aferoj kaj tiuj pri agrikultura konstruado...”

Ŝang-ven aranĝis tiel, ke la proponoj estis klasikaj laŭ sia naturo kaj almetis ankaŭ kelkajn gravajn leterojn al ili respektive. Li helpis sian delegiton kun fervoro.

Laŭ Ĉing prenis la proponojn pri akvokonservado en la mano kaj kalkulis. Cent unu entute kiel en la pasinta fojo. Ĉar la tria distrikto konsistis el 101 administraj vilaĝoj\*, tio montriĝis, ke ĉiu prezentis proponon pri tiu subjekto. Kompare kun la aliaj, tiu ĉi estis la plej grava kaj havis plej multe da voĉoj. En ĉiu propono estis skribite: Konstruu brikodigon, konstruu brikodigon... Li tenante en mano tiun faskon da proponoj rememoris, ke en la unua sesio de la gubernia konferenco de la popolaj reprezentantoj, lastan jaron, li ja prezentis tiun proponon al la registaro je la nomo de la 40,000 loĝantoj de la tria distrikto. Sed siatempe la enlanda milito sur la kontinento ankoraŭ ne finiĝis kaj la ŝtata konstruado nur ĵus komenciĝis. La sumo, kiun oni asignis al la gubernio por akvokonservado estis tute ne menciinda, tial la problemo restis nesolvita. Tio igis la miopulojn tre malkontentaj. Ili atribuis tion al lia senkapableco kaj la manko de demokrata spirito ĉe la registaro. Jen releviĝis la sama problemo; sur lia vizaĝo estiĝis zorgoplena mieno. Ŝang-ven demandis:

“Kion vi pripensas, oĉjo?”

“Mi timas, ke tiu ĉi propono de nia distrikto pri la konstruo de brikodigo eble ne akceptiĝos denove tiun ĉi fojon,” respondis Laŭ Ĉing.

“Se ĝi estus prokrastota, la kaŭzo kuŝus simple en tio, ke la laboro estas giganta kaj la mono ne sufiĉa. Ĉu estas eble, ke la registaro ne volontus servi al la popolo dum ĝi havas sufiĉan monon?”

“Jes, vi ja estas partiano kaj kadro krome, tial vi facile komprenas. Sed inter la amaso, por tiuj, kiuj vidas pli malproksime, la afero estas ankoraŭ klarigebla, dum tiaj homoj kia Laŭ Kang Kvara jam diros, ke la registaro ne zorgas pri la feliĉo de la popolo.”

La edzino de Laŭ Ĉing interrompis de malantaŭ la pordokurteno: “Ne zorgi pri la feliĉo de la popolo! Ili parolas sensencaĵon kun malfermitaj okuloj. Ĉu la okjara rezistbatalo ne finiĝis venke sub la gvidado de la Komunista Partio? Kiu faligis Ĉiang Kaj-ŝek kaj fondis la Centran Popolan Registaron? Kiu eldonis la leĝaron pri la agrara reformo? Ili tute ne pensas, ke ĉiuj, kiujn faris la Popola Registaro, estis grandaj aferoj. Tia homo! Oni metas sunon sur la ĉielon, sed li diras, ke ĝi apartenas al ĉiuj kaj ne servas al li. Se oni donus malhelan olelampon al lia domo, li dirus, ke ĝi estas pli bona ol la suno, ĉar ĝi estas en lia hejmo, tuj apudi li.”

“Vi parolis prave, onjo,” diris Ŝang-ven. “Laŭ Kang Kvara estas ĝuste tia homo, kiu diras, ke malhela olelampo estas pli bona ol la suno. Tamen li malkovros la veron iom post iom.”

“Nia registaro ja ne neglektas la aferojn de la popolo,” asertis Laŭ Ĉing. “Estas tute klare, ke la ĉefa kaŭzo kuŝas en la manko de mono. Kiam mono abundos, la konstruo de brikodigo ja estos facile solvebla problemo.”

Ili daŭrigis la interparoladon, sed la virino ilin urĝis: “Rapidu! Oni jam kolektiĝis sur la strato por vin adiaŭi.”

Tion aŭdinte Laŭ Ĉing movis siajn manojn pli rapide. Li tre ĝojis, ĉar li povis kolekti tiom da proponoj. Jen la pruvo, ke la amaso subtenas la registaron kaj lin konfidas. Li pakis siajn aĵojn kaj metis la proponojn en la tornistran, dirante: “Mi estas delegito de la popolo kaj meritis tiun titolon nur kiam mi bone servos al ĝi.”

Dume oni jam venis tamtamante kaj tamburante por lin elakompani.

Ĉe la ekstremo de la vilaĝo, Laŭ Ĉing diris adiaŭon al la samvilaĝanoj kaj ĉiuj esprimis sian plej intiman penson al sia delegito:

“Kiam vi vidos la guberniestron, diru al li, Laŭ Ĉing, ke li ne nur zorgu pri la laboro neglektante sian fartan. Neglektu nek unu nek la alian.”

“Bonvolu demandi la kamaradojn en la juĝejo, ĉu la petskribo de nia San-ŝiang pri eksedziniĝo jam estas konfirmita?” alia sekvis.

“Nia distrikto ricevis malpli da akvorada prunto ol al unua, bonvolu demandi, kial oni tiel decidis.”

“La kooperativo...”

Laŭ Ĉing notis ĉion laŭvice sur la taglibron, ĝis kiam la suno jam kliniĝis al la horizonto, tiam Ŝang-ven memorigis lin: “Restas ankoraŭ dek du li-oj de la distrikta administrejo, ekiru, se vi trovos ion forgesita, morgaŭ mi portos al vi en la urbon.”

“Unu aferon mi volas scii,” diris Laŭ Ĉing. “Kiam mi troviĝos tie, kion mi diru, se la guberniestro demandus, kiel statas la vivo de ni terkulturistoj?”

Onjo Li faris du paŝojn antaŭen kaj diris: “Diru al li la veron: nia vivstato pliboniĝas tagon post tago, ni delonge ne manĝas branajon.”



“Ne, de post la alvoko al kotonplantado, ni ne nur ne manĝas branon, sed havas blankan farunon ĉiun duan aŭ trian tagon.”

Ŝang-ven urĝadis Laŭ Ĉing tuj foriri. La junaj pioniroj prezentis al li grandan ruĝan floron. La vilaĝestro diris: “Estas la honoro de la tuta vilaĝo, ke Laŭ Ĉing estas elektita popola reprezentanto. Mi esperas, ke li elparolos malkaŝe, se li havas opinion kontraŭ la laboro kaj la kadroj de la vilaĝo.”

Laŭ Ĉing estis surazenigita de la ĉirkaŭanta popolamaso. La amaso kriis ankoraŭ: “Nepre ne forgesu la digokonstruon por la tria distrikto!”

“Mi ne forgesos.” Laŭ Ĉing frapis la azeneton per vipo kaj ĝi ekmovis siajn piedojn.

Laŭ Kang Kvara alkuris dumtempe kun vinkruĉo, ekkaptis la bridon, plenigis pokalon per vino kaj proponis al Laŭ Ĉing: “Eltrinku tiun ĉi pokalon, kaj faru bonan servon al ni ĉe la registaro.”

Laŭ Ĉing malplenigis la pokalon per unu tiro. Poste li adiaŭis la amason per mansvingo. La azeneto iris ĉiam pli malproksimen. Sed la amaso ĉe la vilaĝa enirejo ankoraŭ ne disiĝis kaj rigardis el distanco sian delegiton.

En la pasinteco Laŭ Ĉing estis terlaboristo ĉe bienulo. Post la alveno de la komunistoj, li liberiĝis kaj ricevis teron, ekirigis la produktan interhelpadon de la tuta vilaĝo kaj estis elektita labormodelo de la gubernio. Por la unua konferenco de la popolaj reprezentantoj, la pasintan jaron, li estis elektita reprezentanto de la terkulturistoj kaj komencis administri la ŝtatajn aferojn.

## Ĉapitro II

La duan tagon de la konferenco, Guberniestro Vang faris raporton pri administraj laboroj. Post kontrolado ĉiuj delegitoj diris, ke la laboro de la registaro dum la pasinta unu jaro havis sukceson, precipe, la kontraŭinunda laboro en la kuranta jaro montriĝis pli bona ol en la pasinta. Ĉio estis pretigita, tial dum la inunda sezono oni estis okupataj sed ne konfuziĝaj. En la intersanĝo de krudaj materialoj kaj varoj, la prezo de kotono ĉiam konservis la egalecon al la prezo de pli ol 8 ĝin-ojn da greno. Manĝoprovizo kaj karbo venis ĝustatempe. Unuvorte la laboro de la registaro pliboniĝis ĉiujare.

En la tria tago, Fakoĉefo Ĉaŭ faris raporton pri la finkalkulo de la en- kaj el-spezoj de la lasta jaro kaj la antaŭkalkulo de la kuranta. Li parolis pri unu artikolo post alia kaj skribis la ciferojn sur la nigran tabulon, timante ke oni ne bone aŭdis. Kiam li vidis esprimon de nekompreneo sur la vizaĝo de la delegitoj, li klarigis al ili per fingrokalkulo. Li daŭrigis la paroladon nur kiam li trovis, ke la sulkoj sur iliaj fruntoj glatiĝis.

Post la raporto pri la en- kaj el-spezoj en la pasinta jaro, sekvis tiu de la ĉi-jara budĝeto. Finaŭskultinte Laŭ Ĉing estis tiel ĝoja, ke li apenaŭ povis fermi sian ridantan buŝon. Ĉar la fiksita sumo por la akvokonserva konstruado en ĉi tiu jaro estis kvinoble pli granda ol en la pasinta.

La grupetan diskut-kunvenon en la posttagmezo prezidis la fakoĉefo Ĉaŭ. La delegitoj ne havis opinion pri la lastjara finkalkulo. Silento daŭris pli ol dek minutojn. Ĉaŭ klarigis al ili ankoraŭfoje:

“...Se vi havas opinion kontraŭ la registaro kaj kritikis ĝin el bona intenco, tio same estas subteni la registaron.”



**Laŭ Kang Kvara alkuris dumtempe kun vinkruĉo, ekkaptis la bridon, plenigis pokalon per vino kaj proponis al Laŭ Ĉing: “Eltrinku tiun ĉi pokalon, kaj faru bonan servon al ni ĉe la registaro.”**

“Mi aŭskultis atente kaj nenio estas malklara,” diris Laŭ Ĉing.

“La mono estas ĉiel spezita por la popolo. Neniu kadro ja aĉetis por si domon aŭ teron,” aldonis alia.

Tiam ĉiuj levis sian manon kaj la raporto estis aprobata.

La kunveno iris plue laŭ la programo. Kiam oni diskutis pri la antaŭkalkulo de la elspezo por la akvokonserva konstruado, ĉiuj ekscitiĝis. Unu distrikto volis konstrui digon, alia proponis elfosi kanalon.

Post preciza kalkulo, oni trovis ke tiom da laboroj ne povas plenumiĝi per la 270,000 ĝin-oj da greno. Oni tuj pripensis refoje. La sumo estas pli ol sufiĉa por la konstruo de unu digo sed ne sufiĉa por du. Cetere oni nepre ne devas elspezi la tutan monsumon por digkonstruo.

La proponoj pri akvokonservado koncernis tri digojn. La digo de la Granda Kanalo en la unua distrikto, la digo de Zeja-Rivero en la tria kaj ankoraŭ alia en la sesa. Se estas neeble konstrui ĉiujn, do konstruu unu el ili. Sed kiun unue? Tio ja estas malfacila problemo.

Post longtempa diskutado, duono de la malfacilaĵo estis forigita. La brikodigo en la sesa distrikto montriĝis multe malpli urĝa ol tiuj en la unua kaj tria kaj la konstruado povis esti prokrastita du jarojn. Nun restis nur tiuj du lastaj. Se oni konstruus tiun de la unua distrikto, oni ne povus konstrui samtempe tiun de la tria, kaj inverse.

Post momento de ĝena silento ekparolis la delegito de la dua distrikto: “Laŭ mia opinio, ni konstruu unue tiun de la tria distrikto, ĉar en la pasinta jaro ĝi jam prezentis la proponon al la konferenco. Sed siatempe ni havis nur tre sensignifan sumon por la akvokonserva konstruado, kaj la propono ne estis akceptita. Nun ni havas monon, ni devas unue konstrui ĝian.”

“Miaopinie, kiun ni konstruu unue decidus ne la frueco de la proponado sed ĝia urĝeco,” la delegito de la kvina distrikto esprimis malan opinion.

“Trafe, trafe!” aldonis multaj voĉoj tuj sekve.



**La kluzopordo malfermiĝis en la bruado de krakfajraĵoj. La akvo, pli valora ol oleo, elfluis torente. Miloj da ĉeestantoj saltis pro ĝejego, ne sciante kion fari.**

“Ne teksu tro belajn revojn,” pensis la vilaĝestro, tial li diris: “Mi kredas, ke ĝi ne estas aprobita.”

“Lastjare oni ja promesis, ke ĝi estos konstruata en la venonta jaro,” interrompis Laŭ Kang Kvara.

“Se oni ne konstruus brikodigon, ni havas ankoraŭ hom-digon,” diris Er-ŝing.

“Tamen ĉu ĝi estas aprobita aŭ ne?” demandis refoje la vilaĝestro.

“Vi divenis prave,” respondis Laŭ Ĉing.

Tion aŭdinte Laŭ Kang faris paŝon antaŭen kaj kaptis la brakon de Laŭ Ĉing: “La unuan fojon mono mankis, la duan, mono ne sufiĉis, sed kie kuŝas la kaŭzo ĉi tiun fojon?”

“Ĉi tiun fojon—ĉar mono abundas,” respondis Er-ŝing.

Ĉiuj ridegis. La edzino de Laŭ Ĉing interrompis ilin: “Vi babilis nur sensencaĵojn.”

“Ne sensencaĵojn. La veron li divenis. Tion kaŭzis simple la troabundeco de mono,” diris Laŭ Ĉing.

Ĉiuj konfuziĝis kaj atendis, ke Laŭ Ĉing klarigu, kial la propono estas rifuzita pro troabundo de mono.

Laŭ Ĉing daŭrigis: “Nek timu, nek konfuziĝu, ankaŭ nek ĝoju, nek ĉagreniĝu. Ĉar nia propono postlasiĝis.” “Kio, refoje postlasiĝis?” Ĉiuj estis malĝojigitaj.

“Jes, ĉar ni postlasiĝis. Nia opinio iris alian vojon ol tiu de la ŝtato. Guberniestro Vang diris: ‘La akvo ne estas malbonaĵo en si mem. Ekzemple, nek la homoj nek la greno povas vivi sen ĝi. Estas maljuste enfermi ĝin inter digoj.’”

Laŭ Kang Kvara senpacience piedbatis: “Ho, ho, mia Dio! Do lasu ĝin elflui !?”

Tuj respondis Er-ŝing:

“...Ej! Ĉiuprintempe kiam ni alportis la riverakvon por la semado, ĉu ni ne kvazaŭ invitis ĝin per okhama portseĝo?”

Laŭ Ĉing daŭrigis: “... Ni ne permesos al ĝi liberan elfluon, ni igos ĝin elflui tiom, kiom ni bezonos. La guberniestro diris, ‘Ni havas nun tiun ĉi monon, ni devas ĝin kuraci ĝisfunde. Ni ne devas ĉesi manĝi pro singultado.’”

Laŭ Kang Kvara interrompis: “Mia Dio! Vi povos eduki min iom post iom pli poste. Nun eldiru simple kaj rapide!”

“La opinio de la registaro estas konstrui kluzon,” diris Laŭ Ĉing premante la manon de Laŭ Kang.

\* \* \*

La Popola Registaro neniam prokrastas, en sia laboro por la popolo. Dirite, farite. Post la decido, ĝi venigis inĝenieron el la provinca ĉefurbo, mobilizis kamparanojn - laboristojn, pretigis ĉiujn materialojn kaj tuj komencis la konstruadon. Pasis du monatoj kaj kvin tagoj kaj la cementa kluzo jam estis konstruita. Apud la kluzo estis starigita ŝton-tabulo, sur kiu gravuriĝis tri grandaj ideografoj: “Li Min Ĉa” (kluzo, kiu utilas al la popolo).

Estis la fino de la tria monato laŭ la luna kalendaro. Ankoraŭ ne pluvis. En la pasinteco, tiuokaze oni devis alporti riverakvon por la semado. Estas tute alie nun. La homoj neniel maltrankviliĝis.

La soleno por la ellaso de la akvo okazis la 27an de tiu monato. Preskaŭ la tuta loĝantaro de la distrikto partoprenis. Estiĝis hommaro. La kluzopordo malfermiĝis en la bruado de krakfajraĵoj. La akvo, pli valora ol oleo, elfluis torente. Miloj da ĉeestantoj saltis pro ĝejego, ne sciante kion fari.

“Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu la Popola Registaro!” plengorĝe kriis la amaso unuvoĉe.

La guberniestro manpremis kun la ĉeestantoj kaj sin kuraĝigis reciproke.

La akvo fluis laŭ la difinita vojo. Kiam ĝi atingis la vilaĝon Selitun, la tieaj popolanoj diris; “Ĝi devenas de nia propono.” Ĝi fluis tra Selitun al la vilaĝo Ŝjekiaĉen, kaj ties loĝantoj diris: “La registaro ne nur agis laŭ nia postulo, sed ĝi faris ĉion pli perfekte ol ni povas deziri.”

La akvo fluis ĉe la kampon de Laŭ Kang Kvara, kiu gvidis ĝin en sian teron, tuj konsciis, ke antaŭe li vidis tro proksime kaj diris kun hontemo: “Jen bona registaro, bona reprezentanto. Mi volas vivi pli longe por lerni pli multe da novaj lecionoj!”

La riverakvo fekundigis la fruktodonan kotonkampojn. La pliproduktado kaj la kontribuado, kiuj estis skribitaj en la patriotaj kontraktoj de la terkulturistoj akiris potencon garantian.

En la solena kunveno Laŭ Ĉing paroladis al la amaso:

“Nia konstruado kaŭzu ĉagrenon al la Usona imperiismo. Ni ĉinoj povas konstrui nian belan vivon kaj ankaŭ ĝin defendi sub la gvidado de Prezidanto Maŭ.”

Kriis la milicanoj, gejunuloj kaj geviroj: “Defendi la feliĉan vivon estas nia devo. Ni estas ĉiam pretaj partopreni en la nacidefenda armeo!”

La rivero, kiu longe malutilis al la homoj, komencis servi al la popolo sub la popola regado. Nuntempe tio estas nova afero, sed baldaŭ fariĝos ordinara post kelkaj jaroj.

Tradukis S. J.

\* *administra vilaĝo*: administra unuo arte farita, diferenca de natura vilaĝo kiu nature elkreskas kaj eble ne konvenas por esti administrata kiel unuo.

† *gaŭliang-o*: (Bot.) *Andropogon sorghum*.



## NI NE PERMESAS TIAN FAŝISMAN BARBARON!

Karaj kamaradoj!

Hodiaŭ mi raportas al vi kaj ĉiuj kamaradoj pacamantaj de l' mondo per via bulteno nian kontraŭkoloniigan batalon en la 20a de feb.. Vespere de tiu tago, fininte la lern-taskon mi forlasis la studĉambron de mia universitato ĉirkaŭ la 6-a horo. Survoje al mia hejmo mi trovis mian k-don K. (membro de la studenta komitato de nia fakultato) ĉirkaŭata de multaj civiluloj, studentoj kaj policistoj. Alirinte mi informiĝis, ke k-do K., kiu agluis la decidon de nia studenta kunsido alvokanta al civitanoj pro la maljusta plialtigo de lernkosto, estas arestata de la policistoj perfekte kontraŭleĝe sen iom da kialo. La popolamaso kontraŭstaris la maljustan areston. Ankaŭ mi estis komitatano de la aŭtonomia studenta komitato kaj malamis tian areston. Mi deziris liberigi mian kamaradon K. kune kun la aliaj kamaradoj.

La protesto daŭris ĉirkaŭ 3 horojn kaj la protestanta popolamaso pli kaj pli grandiĝis. Finfine la policistoj, pensante ke ili ne povas aresti k-don K., telefone petis helpon al la milita polico de la okupanta armeo Usona, kiu baldaŭ alsendis 6 aŭtojn da policistoj kaj samtempe alvenis ankaŭ du aŭtoj da japanaj policistoj armitaj per Usonaj pistoloj.

Mi rapide rekuris en mian lernejon kaj alvokis al la studentoj restantaj por speciala studo ke ili aliru por savi mian kamaradon. Sed kiam mi alvenis tien kun ĉirkaŭ 100 studentoj, mi trovis ke la vojo proksime de la aferloko estis fermita de armitaj japanaj policistoj. Mi ek-kantis kun la kamaradoj "Defendu la Pacon," protestante la kontraŭleĝan areston maljustan.

Enaŭtiginte k-don K. la japanaj kaj Usonaj militaj policistoj alvenis al ni kaj unu Usona ĉefo komandis al japanaj policistoj, "Ilin disigu, forigu de ĉi tie!" Sed ni ne povis permesi tian maljustan areston faŝisman, tial ni daŭre protestis kontraŭ ili. Respondante nian proteston, milita polica ĉefo ordonis minacante per pafado, "Arestu ĉiujn studentojn." Kaj ses k-doj arestiĝis.

Ni, man-en-mane defendis tiujn 6 kamaradojn, kiujn, spite de nia protesto, la policistoj ĵetis en sian ŝarĝaŭton. Ree leviĝis la packanto

pli laŭte. La furioziĝantaj frenezuloj Usonaj ree ordonis, "Arestu tiun!" kaj mi kun alia studento kiu klopodis savi min, estis arestita.

En la malliberejo de la stabo de la Usona milita polico, en la teruro de revolvero kaj torturo mi estis esplorde- mandata. Sed malgraŭ ilia timigo, piedbato, bastonado, nenion ili povis akiri de mi kaj eĉ ne mian nomon. La torturo de moderna stilo Usona daŭris ĝis la 12-a horo. Kaj la sekvantan tagon mi estis translokigita kun 7 k-doj en ĉelon nur 6 kvadratajn metrojn larĝan de japana policejo.

Samtempe en tiu tago ĉiuj fakultatoj de mia universitato leviĝis kaj protestis kontraŭ la policistoj subtenate de multaj, preskaŭ ĉiuj, profesoroj, precipe de nia plej estimata profesoro, fakultatĉefo de juroscienco, Tecuhiko Tozaŭa, kiu kuraĝe



aliris sola al la stabo de Usona armeo kaj protestis por ni.

La sekvantan vesperon ni estis liberigataj fine pro la forta protesto. Sed hodiaŭ ankoraŭ 2 studentoj arestitaj pro la sama afero estas ne liberigitaj. Nia agado por savi ilin estas daŭranta malgraŭ ke ni estas en tre malbona situacio, nome, ĉiuj studentoj devas ricevi la ekzamenon de ĉijara kurso, kaj sen ricevo de tiu ekzameno neniu studento povos fini sian tutan kurson.

Pacamantaj popoloj de l' mondo! Pacbatalantoj de Ĉinio! Kiel ni jam spertis, la lastjara repaciĝo, la packontrakto, la t.n. "Repaciĝo de Kompromiso kaj Konfido" estas kontrakto de barbarismo kaj revolvero. Ni jam konis la esencon de ĉi tiu falsa repaciĝo.

Ni, kune kun ĉiuj popoloj de l' mondo, ne permesas tian faŝismon barbaran!

Sub la standardo de internaciismo ni ĉiam batalos por paco—nia sankta celo.

Salutas kamarade via

A. T. Japanio

## LA PACAMA NEDERLANDA POPOLO BATALAS KONTRAU FAŝISTIDOJ

Karaj kamaradoj,

...Eble vi povas rememori mian antaŭan leteron, kiun vi parte publikigis. Nu, pro tiu letero mi estas eksigita el SAT... Mi devis respondi antaŭ Plenumkomitato kaj Konfliktkomitato de SAT pro mia "mal-kamaradeca" agado, sed mi respondis letere, ke estas al mi granda honoro esti eksigata pro tiu afero.

Nun mi aliĝis al SEAT, tiu Esp-organizo, kiu aktive batalas por paco, kaj kiu estas pro tio malpermesita en Francio. Mi fondis tradukservon kaj skribis pri tio al la nura progresema gazeto en nia lando. La ĉefredaktoro de ĝi akceptis mian proponon de tempo al tempo presi artikolojn, kiujn mi tradukas el progresemaj Esp-gazetoj. Pasintan semajnon mi tradukis el la dec. numero de via organo du artikolojn, nome tiun pri la fervojo kaj tiun pri la instruado en nova Ĉinio. Mi tre esperas, ke oni almenaŭ parte publikigos ĝin. Se jes, mi sendos al vi kelkajn ekzemplerojn de la gazeto. La antaŭan fojon mia klopodo malsukcesis, pro tio, ke mi ne antaŭe skribis pri la afero al la redaktejo de la gazeto.

Nun io pri nia lando. Ankaŭ ĉi tie la faŝismo pli kaj pli estas restarigita. Ordone de Vaŝingtono "nia" registaro malpermesis la rememoron de Hanny Schaft, komunistino, kiu estis en 1945 entombigita kiel simbolo (!) de la Nederlanda antifaŝista rezisto. Malgraŭ maŝin-pafiloj kaj kirasautomobiloj kun amaso da policistoj oni grandamase demonstraciis tra la urbo Haarlem. Laŭ la oficialaj sciigoj de la policistaro ĉeestis kvarfoje tiom da demonstraciantoj kiom dum la antaŭaj jaroj! Nun oni malpermesis la rememoron de la fama Februara Striko, kiu eksplodis en Amsterdamo kontraŭ la judo-pogromoj de la naziistoj. Sendube ĉi tiu malpermeso same fiaskos kiel la antaŭaj malpermesoj. Pri tio zorgos la antifaŝista pacama Nederlanda popolo.

Ruĝfrate salutas via

R. B.

## Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la *jurnalo aŭ gazeto*, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata  
de Fremdlingva Eldonejo

26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

## ENHAVO

*Bildo sur la kovrilo—Feliĉaj  
Infanoj de Nova Ĉinio*

**La Historia Movado kontraŭ  
Korupta Alproprigo, Malsparo  
kaj Burokratismo**

**Heroinoj sur la Korea Fronto**

**La Plej Bona Porcelano de  
Ĉinio**

**Kiel Ni Traktas la Militkaptitojn  
Pliprodukto kaj Ŝparo**

**Nova Ĉangŝa**

*Nova Ĉinio en Bildoj—La Ĉeng-  
tu-Ĉungking-a Fervojo; Ĉinaj  
Heroinoj sur la Korea Fronto*

**Kuo Mo-jo—Batalanto por Paco  
Propono de la Tria Distrikto**

## PAGU AL NIAJ PERANTOJ

**Aŭstralio:** Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park,  
N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)

**Aŭstrio:** Antonio Balague, St.-Pölten, Kirchenweg 12.  
(Jarabono 20 schilling-oj)

**Belgio:** Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10, Bruselo.  
(Poŝtekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

**Britlando:** (1) F-ino F. Paraige, 10 Woronzow Road, St. John's  
Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)  
(2) **Universala Esperanto-Asocio**, Heronsgate, Rick-  
mansworth, (Herts.).

**Bulgario:** (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI  
UŜI, 15. (Jarabono 200 Lv.)  
(2) Ivan Kovaĉev, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.

**Ĉeĥoslovakio:** Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. ĉ. 6,  
(Jarabono 50 kĉs.)

**Danlando:** Borge Astrup, Ymersvej 32, Randers.  
(Jarabono 6 kronoj)

**Finnlando:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9.  
(Jarabono: 300 Fmk.)

**Francio:** Labor-Esperantista Federacio, sekretario: 4 str. Gen.  
Malleterre, PARIS 16. CCP 902-52 (Jarabono: Fr. F. 450)

**Germanio:** (1) Helmut Löffler, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1.  
(Jarabono: 6 D.M.)  
(2) Heiny Knorr, (24) Hamburg-Wellingsbüttel,  
Ekerkamp 81.

**Hungario:** (1) KULTURA, Budapest, V. Akademia u. 10.  
(Jarabono 15 forintoj)  
(2) Marton Lajos, Bors.-u. 2, Budapest, XII,  
(poŝtkonto 38.187)

**Islando:** Siguldur Gudmundsson, Falkagata 1, Reykjavik.  
(Jarabono 15 kronoj)

**Italio:** (1) Itala Laborista Esperanto-Asocio, Via Modena 33—  
Torino. (Jarabono: 400 liroj)  
(2) Eduardo Zumbo, Casella postale 226, Torino.

**Izraelio:** Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

**Japanio:** (jarabono 360 jen-oj)

**Nederlando:** (1) Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223,  
Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)  
(2) Esperanto-Grupo Vaals, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.

**Pollando:** Asocio de Esperantistoj en Pollando, Warszawa Marszal-  
kowska 81/32. (Poŝteka konto I—4329/113)  
(Jarabono 12 zl.)

**Rumanio:** Rumana Esperantista Societo, București I, Bulev. 6  
Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)

**Svedio:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg.  
(Jarabono 5 kronoj)

**Usono:** (jarabono \$1.25)

**Rim:** Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj  
(1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj).  
Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.